


EL POPOLA ĈINIO

外文出版社
出版部
出版科



EN MEMORO DE J. V. STALIN

73
Apr.
1953

La Plej Granda Amikeco

Maŭ Ze-tung

Jozefo Vissarionoviĉ Stalin, la plej granda geniulo de la nuna epoko, la granda instruisto de la tutmonda komunista movado, la batal-kamarado de la senmorta Lenin, jam forlasis la mondon.

La kontribuo de kamarado Stalin al nia epoko per agadoj teoriaj kaj praktikaj estas netaksebla. Kamarado Stalin reprezentas nian tutan novan epokon. Liaj agadoj kondukis la Sovetian popolon kaj la laborantan popolon de ĉiuj landoj transformi la tutmondan situacion, kio signifas ke la justa, popoldemokratia kaj socialista afero akiris venkon en grandega parto de la mondo, parto kiu enhavas trionon de la tutmonda loĝantaro—800 milionoj da popolanoj; krome la influo de tiu ĉi venko pli kaj pli disvastiĝas al ĉiuj anguloj de la terglobo.

La forpaso de kamarado Stalin kaŭzis senkompare profundan malĝojon al la laboranta popolo de la tuta mondo kaj ekscitis la korojn de la justaj homoj tutmondaj. Tio elmontras ke la afero de kamarado Stalin kaj liaj ideoj kaptis la vastan popolamason de la tuta mondo kaj jam fariĝis nevenkebla forto kiu kondukos la popolojn, kiuj jam akiris venkon, de venko al nova venko kaj ebligos ĉiujn homojn, kiuj ĝemas sub la subpremado de la malnova, malvirta, kapitalista mondo, kuraĝe ataki la malamikojn de la popolo.

Post la forpaso de Lenin, kamarado Stalin gvidis la Sovetian popolon konstrui en brilan socialistan socion, la unuan socialistan ŝtaton de la mondo, kiun kamarado Stalin kaj la granda Lenin kune kreis dum la Oktobra Revolucio. La venko de la Sovetia socialista konstruado estas ne nur venko de la Sovetia popolo sed ankaŭ komuna venko de la tutmonda popolo. Unue, tiu ĉi venko pruvis la senliman korektecon de marksismo-leninismo per la absolutaj realoj de la vivo kaj instruis konkrete al la tutmonda laboranta popolo kiel ili devas antaŭeniri al bona vivo. Due, tiu ĉi venko garantiis la forton al la homaro por venki super la faŝistaj bestoj dum la Dua Mondmilito. Sen la venko de la Sovetia, socialista konstruado, estas neimagebla la triumfo en la kontraŭ-faŝista milito. La sorto de la tuta homaro ligiĝis al la venko de la socialista konstruado

en Sovetunio kaj al la venko de la kontraŭ-faŝista milito, kaj la gloro de tiuj ĉi venkoj devas aparteni al nia granda kamarado Stalin.

Kamarado Stalin efektivigis ĉiufланkan, epokfaran disvolvон de la teorioj de marksismo-leninismo kaj antaŭenpuŝis marksismon al nova etapo. Kamarado Stalin kree disvolvis la teoriojn de Lenin pri la leĝo ke la disvolviĝo de kapitalismo ne estas ĉie egala kaj pri tio ke socialismo povas venki unue en unu lando; kamarado Stalin kree kontribuis la teorion pri la ĝenerala krizo de kapitalista sistemo, la teorion pri la konstruado de komunismo en Sovetunio, la teorion pri la fundamentaj ekonomiaj principoj de la nuntempa kapitalismo kaj socialismo kaj la teorion pri la revolucio en koloniaj kaj duon-koloniaj landoj. Kamarado Stalin ankaŭ kree disvolvis la teorion de Lenin pri la konstruado de la Partio. Ĉiuj tiuj kreaĵoj teorioj de kamarado Stalin plue unuigis la tutmondajn laboristojn kaj plue unuigis la subprematajn klasojn kaj subprematajn popolojn, igante la batalon de la tutmonda laborista klaso kaj ĉiuj subpremataj popoloj por liberiĝo kaj feliĉo kaj ties venkon atingi senprecedencan amplekson.

Ĉiuj verkoj de kamarado Stalin estas senmortaj dokumentoj de marksismo. Liaj “Fundamentoj de Leninismo”, “La Historio de la Komunista Partio de Sovetunio (Bolŝevikoj)” kaj lia lasta granda verko, “La Ekonomiaj Problemoj de Socialismo en Sovetunio” estas enciklopedio de marksismo-leninismo kaj estas resumo de la spertoj de la tutmonda socialista movado dum la pasintaj cent jaroj. Lia parolado en la 19a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio estas altvalora testamento por ĉiulandaj komunistoj de la tuta mondo. Same kiel ĉiulandaj komunistoj de la tuta mondo, ni ĉinaj komunistoj trovas nian propran vojon al triumfo en la grandaj verkoj de kamarado Stalin.

Depost la forpaso de Lenin, kamarado Stalin estis ĉiam la centra figuro en la tutmonda komunista movado. Ni kolektigis ĉirkaŭ li, senĉese petis de li konsilojn kaj konstante ĉerpis idean forton el liaj verkoj. Kamarado Stalin estis plena de varma amo al la subpremataj popoloj de la Oriento. “Ne

forgesu la Orienton" — tio estas la granda alvoko de kamarado Stalin post la Oktobra Revolucio. Ĉiuj scias ke kamarado Stalin arde amis la ĉinan popolon kaj konsideris la revolucion forton de Ĉinio nemezurebla. Al la problemo de ĉina revolucio li kontribuis sian subliman saĝon. Kaj ĝuste dank' al sekvado al la teorioj de Lenin kaj Stalin kaj la subtenado de la granda Sovetunio kaj ĉiuj revolucia fortoj de ĉiuj aliaj landoj la Ĉina Komunista Partio kaj la ĉina popolo akiris historian triumfon antaŭ kelkaj jaroj.

Nun ni perdis nian grandan instruiston kaj plej sinceran amikon—kamarado Stalin. Kia katastrofo tio estas! Ne troviĝas vortoj kiuj povas esprimi nian profundan malĝojon kiun tiu malfeliĉo alportis al ni.

Nia tasko estas ŝanĝi la malĝojon en forton. Memore al nia granda instruisto Stalin, senlime plifortiĝos la granda amikeco kiu ekzistas en la nomo de Stalin inter la Ĉina Komunista Partio kaj la ĉina popolo kaj la Sovetia Komunista Partio kaj la Sovetia popolo. La ĉinaj komunistoj kaj la ĉina popolo pliintensigos sian lernadon pri la teorioj de Stalin kaj pri la Sovetiaj scienco kaj tekniko por konstrui nian landon.

La Komunista Partio de Sovetunio estas partio persone edukita de Lenin kaj Stalin kaj ĝi estas la plej progressa, la plej sperta kaj teorie plej bone kulturita en la mondo. Tiu ĉi partio estis kaj estas nia modelo en la pasinteco kaj la estanteco kaj ankoraŭ estos nia modelo en la estonteco. Ni plene kredas ke la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio kaj la Sovetia Registaro, estrataj de kamarado Malenkov, certe povos sekvi la volon de kamarado Stalin, kaj antaŭenpuŝi la grandan komunistan aferon kaj ĝin konduki al brila disvolviĝo.

Estas tute sendube ke la monda tendaro de paco, demokratio kaj socialismo kun Sovetunio ĉe la kapo fariĝos ankoraŭ pli bone unuiginta kaj fariĝos ankoraŭ pli forta.

Dum la pasintaj tridek jaroj la teorioj de kamarado Stalin kaj la modelo de la socialisma konstruado de Sovetunio antaŭen-



La Kontraktigo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo

Olepentraĵo de V. Vihtinskiĵ, B. Ĵukov, E. Levin, L. Ĉernov, L. Ŝmatko

puŝis la mondan progreson je grandaj paŝoj. Nun Sovetunio jam fariĝis tiel forta, la revolucio de la ĉina popolo jam akiris tiel grandan venkon, la konstrulaboro de la popoldemokratioj jam atingis tiel grandan sukceson, la kontraŭ-subprema kaj kontraŭ-agresa movado de ĉiulandaj popoloj tra la tuta mondo jam tiel alte tajdas kaj nia fronto de amikeco kaj unuigo fariĝis tiel fortika ke ni povas definitive aserti ke ni timas nenian imperialistan agreson. Ĉiu ajn imperialista agreso estos frakasita de ni kaj ĉiu malnobla provoko estos vana.

La amikeco inter la grandaj popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio estas tute nerompebla, ĉar nia amikeco estas konstruita surbaze de la granda principo de internaciismo de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. La amikeco inter la ĉina kaj Sovetia popoloj, la popoloj de la popoldemokratioj kaj la popoloj de ĉiuj landoj tutmondaj kiuj amas pacon, demokration kaj justecon estas ankaŭ konstruita surbaze de tiu granda principo de internaciismo kaj tial estas ankaŭ tute nerompebla.

Evidente, la forto kreskanta el tiu amikeco inter ni estas senlima kaj vere nevenkebla.

Lasu ĉiujn imperialistajn agresantojn kaj militinstigantojn tremi antaŭ nia granda amikeco!

Vivu la teorioj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin!

Senmorta estas la glora nomo de la granda Stalin!

Funebras la Tuta Lando pri la Morto de J. V. Stalin

—Nia Korespondanto—

La 475 milionoj da ĉinaj popolanoj funebras la morton de kamarado Stalin, gvidanto kaj instruisto de la laboranta popolo tra la mondo, la plej estimata kaj amata amiko de la ĉina popolo. En ĉiu angulo de la vasta lando regas atmosfero de soleno, de malĝojo plej profunda—kaj de kuraĝa sindediĉo al la afero de Stalin —la afero de la emancipo kaj feliĉo de la tuta homaro.

Posttagmeze de la 6-a de marto, je la dua kaj duono la popolo de Ĉinio aŭskultis en dolora silento la anoncon de Radio Pekina ke la koro de Stalin jam ĉesis batadi.

Pekino transformiĝis en urbon de funebro. Sur la Placo de Tien'an-pordego, la koro de la ĉefurbo, la nacia flago iom post iom mallevigis ĝis duon-masto. Tra la tuta urbo, sur ĉiu domo kaj oficejo, flagoj kun funebraj rubandoj flirtis ĉe duon-masto. La famaj parkoj fariĝis silentaj, senhomaj. Fermiĝis kinejoj kaj teatroj. Ĉiuj festoj estis nuligitaj. En temploj, moskeoj kaj preĝejoj okazis memorigaj preĝoj. Junulojn kaj maljunulojn saturis sento de perdo persona, kaj samtempe konscio pri malfeliĉo landa kaj monda.

La saman posttagmezon Prezidanto Maŭ Ze-tung en akompano de 26 membroj el la Centra Komitato de la Komunista Partio vizitis la Sovetian Ambasadorejon por esprimi sian kondolencon al Ambasadoro A. S. Panjuŝkin. Ilin sekvis multaj aliaj gvidantoj de la registaro, demokrataj partioj kaj popolamasaj organizoj.

Popolo Droninta en Malĝojo

Frue en la posttagmezo je la 4a de marto kiam la brodkastaj stacioj transsendis la novaĵon pri la malsaniĝo de kamarado Stalin, milionoj da koroj en Ĉinio forflugis al li. Prezidanto Maŭ Ze-tung kun siaj intimaj batalkamaradoj, Ĉu Teh, Ĉou En-laj kaj Kaŭ Kang, tuj iris viziti Ambasadoron A. S. Panjuŝkin en la Sovetia Ambasadorejo kaj petis lin transdoni la maltrankvilan kaj ardan deziron de la ĉina popolo por baldaŭa resaniĝo de Stalin. Mesaĝojn espriman-

tajn sian profundan zorgon al Stalin sendis Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la ĉefaj organizoj en Ĉinio. Homoj tra la tuta lando kolektiĝis ĉe siaj radiaparatoj, atendante kun maltrankvilo komunikajon pri pliboniĝo de la sano de Stalin.

Kun sento de peza perdo la ĉina popolo sciigis pri la forpaso de kamarado Stalin.

En urboj, urbetoj, industriaj centroj kaj malgrandaj vilaĝoj regis silento tuj kiam la ĉina popolo konsciis la vastan influon de ĉi tiu perdo al la mondo.

Dum tiu funebra momento Prezidanto Maŭ Ze-tung donis en la nomo de la Centra Popola Registaro la ordonon ke flagoj devas esti hisataj je duona masto tra la tuta lando de la 7a ĝis la 9a de marto por esprimi la senliman malĝojon kaj kondolencon de la ĉina popolo.

Je la 7a de marto, 18-membra delegitaro gvidata de Ĉou En-laj, Sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Ĉefministro de la Centra Popola Registaro estis nomita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Centra Popola Registaro kaj la Landa Komitato de la Politika Konsiliga Konferenco de Ĉina Popolo por ĉeesti la funebbron de kamarado Stalin en Moskvo. La delegitaro tuj flugis al Moskvo.

Dume la popolo en nombro de dekoj da miloj fluis al la Sovetiaj reprezentantoj en la Ambasadorejo kaj ĉiuj konsulejoj por esprimi kondolencon. Kun frata simpatio ili

premis la manojn de la Sovetiaj specialistoj kiuj helpas ilin en tiel multaj laborkampoj.

Adoro al Stalin

Dum tiuj funebraj tagoj manifestiĝis la profundece de la amo kaj adoro de la ĉina popolo al Stalin. Je la 6a kaj 7a de marto, tri kilometrojn longaj kolonoj da funebrantoj atendis sian vicon antaŭ la Ambasadorejo por esprimi sian respekton. Inter ĉi tiuj 200,000 homoj estis laboristoj, kamparanoj, membroj de la popolaj defendfortoj, membroj de la Komunista Partio kaj aliaj demokrataj partioj, viroj kaj virinoj el religiaj or-



Artikoloj, kaj raportoj aperis en ĉiuj ĉefaj ĵurnaloj de Ĉinio pri la forpaso de kamarado Stalin.

ganizoj, komercistoj, studentoj kaj dommastrinoj. Malgraŭ la granda amasiĝo la vojo estis senbrua kiel en funebra ĉambro.

En atmosfero de kvietas soleno ili eniris la Ambasadorejon kaj preterpasante en vico la portreton de Stalin, haltis por momento kun klinita kapo esprimante tributon al la granda gvidanto de la laboranta popolo tra la mondo. Multaj lasis mesaĝojn. Estis multfoje ripetita la solena ĵuro: "Ni ĉiam marŝos laŭ la vojo kiun vi al ni montris!"

Ili metis siajn girlandojn ĉirkaŭ la portreto de J. V. Stalin en la akceptejo kaj ĝi estis tuj ĉirkaŭita de amasego da floroj. Kuŝanta en la mezo estis la girlando prezentita de Prezidanto Maŭ Ze-tung, kun la surskribo: "Kamarado Stalin estas senmorta."

La Gvidanto de Laboristoj

La ĉina laborista klaso, edukita per instruoj de Stalin, profunde malĝoĝiĝis pro la morto de sia granda instruisto. Pensoj reiris al la tagoj de la ĉina revolucio dum ĝia longa vojo de malfacilaj bataloj al venko, de la amareco de la malnovaj tagoj ĝis la feliĉo post liberigo. Je ĉiu etapo ĝi estis ligita kun la nomo de Stalin. Memorigajn kunvenojn kiuj okazis en fabrikoj kaj minoj tra la tuta Ĉinio ĉeestis centoj da miloj da homoj. Ili reiris al siaj torniloj kaj stabloj kun nova forto inspirita de la memoro pri tiu kies tuta vivo estis dediĉita al la afero de la laboranta popolo.

En la registaraj oficejoj de Pekino, en la ĉambroj kie la grandaj planoj de landa konstruado en 1953 estas prilaborataj ĝis la plej subtilaj detaloj kaj ankoraŭ pli grandaj konstruaj taskoj estas projektataj, ĉiu laboro ĉesis dum la forpaso de la plej granda plananto de nia tago estis anoncata.

La malfeliĉa novaĵo disvastiĝis tra la kamparo. Kun peza koro la kamparanoj rememoris kiel ĉiu granda ŝanĝo en ilia vivo rilatas al tiu honora nomo: la reformo, la terkulturaj instrumentoj kiujn ili uzas, novaj progresintaj terkulturaj metodoj, interhelppaj grupoj. La kamparanoj de la Kooperativo de Jing Vej-ĉen rememoris kiel Stalin sendis agronomon por ilin viziti. Ja estis li, kiu instruis al ili novan metodon per kiu ili povis rikolti 2500 kilogramojn da terpomoj po muo anstataŭ la antaŭaj 1500 kilogramoj. Ili petis sian Sovetian amikon porti al Stalin donacon el siaj plej bonaj produktaĵoj. Sed nun Stalin, la amiko de la kamparanoj, forpasis!

Ŝtaliaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo larmis nereteneble pro la morto de Stalin. 38-jara Ho Ĉen-ŝin, divizia komisaro de PLA., parolis por la tuta armeo kiam li ĵuris antaŭ la portreto de Stalin: "Mi nepre lernos konstante de via spirito de sinforĝesa dediĉo al la nobla afero de Komunismo." Li rememoris la fruajn tagojn de sia infanaĝo kiel malriĉa ekspluatata kamparano kaj la grandan 25.000 liojn Longan Marŝon kun ĝiaj nekredeblaj malfaciloj. "Tra la Longa Marŝo, Stalin vivis en nia koro. La viva ekzemplo de Sovetio, kun Stalin kiel ĝia gvidanto donis al ni forton kaj kuraĝon antaŭenmarŝi!"

Studentoj de la Kolegio de Naciaj Minoritatoj esprimis la profundan senton de perdo de ĉiuj siaj samnacionoj. Ili sciis ke la granda kontribuo de Stalin al la solvo de la nacia problemoj donis al ili kaj popolo kiel ili en Sovetio kaj ĉiuj popolaj demokratioj egalrajton kaj ŝancon por nova, libera vivo. Vestitaj en siaj tradiciaj kostumoj, ili iris al la Sovetia Ambasadorejo.

Antaŭ la portreto de Stalin ili ĵuris studi pli energie kaj esti indaj lernantoj de la gvidanto de la popoloj.

Setu Mej-tang, 87-jara reprezentanto de la transmaraj ĉinoj, antaŭ la portreto de Stalin en la Sovetia Ambasadorejo en Pekino, diris: "Vi helpis al ni ĝis venko. Vi helpis al ni en nia landa konstruado. Kiel ni povas iam ajn forgesi vian helpon!"

La dommastrina grupeto de Ŝoŝakua-strateto de Pekino esprimis la senton de la ordinaraj homoj kiam ili aldonis unu klaŭzon al sia kolektiva patriota pakto: "Kiel eble plej bone plifortigi la amikecon inter la ĉina kaj Sovetia popoloj!"

Tra la tuta lando, la anoj de ĉiu socitavolo de la loĝantaro esprimis sian estimon al sia granda gvidanto kaj instruisto. Memorajn kunvenojn okazigis la demokrataj partioj, registaraj oficejoj, la diversaj popolamasaj organizoj, universitatoj kaj lernejoj. Dekoj da miloj da mesaĝoj de kondolenco estis senditaj al Moskvo el Pekino, el ĉi tiuj kunvenoj, el diversaj provincoj kaj urboj, el regionoj kie loĝas la naciminoritatoj kaj el la ŝipoj veturantaj sur ĉinaj maroj. La Tutĉinia Demokrata Virina Federacio, sciigante tra la lando ke ĉiuj programoj por celebri Virinan Tagon je la 8a de marto devas nuliĝi, alvokis al ĉiuj virinoj sekvi la vojon montritan de Stalin por la emancipo de ĉiuj virinoj de la mondo kaj duobligi sian penon en la konstruado de sia patrolando.

Lerni de Stalin

Je la 7a de marto, ĉiuj ĵurnaloj kun nigraj funebraj borderoj dediĉis sian tutan spacon al raportoj pri la forpaso de kamarado Stalin, al mesaĝoj de kondolenco. Sur ili presiĝis grandaj portretoj de Stalin kaj fotoj de diversaj memorigaj kunvenoj. Je la 9a de marto, la ĵurnaloj dediĉis sian frontpaĝon al artikolo de Prezidanto Maŭ Ze-tung en memorigo de kamarado Stalin—*La Plej Granda Amikeco*.

Homoj en ĉiuj urboj rapidis al librejoj por aĉeti la verkojn de kamarado Stalin kaj skribaĵojn pri liaj vivo kaj instruoj. Je la 7a de marto, pli ol 4000 ekzemplerojn da verkoj de Stalin vendis sola la centra Ŝinhua-librejo. Tiaj eldonaĵoj samkiel portretoj de kamarado Stalin baldaŭ tute elĉerpiĝis. Por plenumi la urĝan postulon, la Popola Eldonejo rapidigis la presadon de 15 el la plej famaj verkoj de Stalin. Por profundigi al partianoj kaj registaraj laborantoj komprenon pri la genio de kamarado Stalin, liaj instruoj kaj senmorta agado kaj plifortigi la nerompeblan amikecon inter la Sovetia kaj ĉina popoloj, la regula politika teoria studo de ĉiuj registaraj kadroj ĉesis de la 12a ĝis 25a de marto por ebligi ilin studi la gravajn dokumentojn en memoro de kamarado Stalin.

Funebro Landskala

Je la 9a de marto la ĉina popolo, samtempe kun la Sovetia popolo, kun tiuj de la popolaj demokratioj kaj ĉiuj honestaj homoj tra la mondo, adiaŭis sian amatan gvidanton kaj instruiston Stalin. Konforme al la instrukcioj fare de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Centra Popola Registaro kaj la Landa Komitato de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo, dum la horo kiam la funebra ceremonio okazis en Moskvo, ĉiuj fabrikoj, minoj, vagonaroj kaj ŝipoj en Ĉinio fajfigis siajn ŝirenojn. Kie la signaloj aŭdiĝis aŭ la radio atingis, tie dekoj da milionoj da ĉinoj observis solenan kvinminutan silenton.

La Ĉina Popolo Funebras la Morton de Kamarado Klement Gottwald

La 15an de marto, kiam la ĉina popolo estis funebranta la morton de granda kamarado Stalin, ĝin atingis la malfeliĉega informo pri la forpaso de ĝia intima amiko Klement Gottwald, prezidanto de la Ĉeĥoslovakia Respubliko.

Ricevinte tiun malĝojigan informon, Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj aliaj gvidantoj de la Centra Popola Registaro tuj vizitis la Ĉeĥoslovakian Ambasadorejon en Pekino por esprimi sian kondolencon. Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, la Landa Komitato de la Politika Konsiliga Konferenco de Ĉina Popolo kaj aliaj organizoj telegrafis al la Ĉeĥoslovakia Registaro por esprimi sian funebran sen-



ton. Kaj delegitaro sub la gvido de Ĉefministro Ĉou En-laj estis sendita de la Centra Popola Registaro de Ĉinio al Praha por ĉeesti la funebran ceremonion.

Ekde la 15a de marto, la Ĉeĥoslovakia Ambasadorejo en Pekino estis tage kaj nokte vizitata de funebraj homfluoĵoj. Kaj je la tago kiam okazis la adiaŭa ceremonio en Praha, la naci-flago de Ĉinio funebre hisigis je duona masto tra la tuta lando. Kun profunda doloro, popolo de Ĉinio funebbris la popolan gvidanton de la Ĉeĥoslovakia popolo, kaj montris sian fortan volon plifortigi la solidarecon kun la Ĉeĥoslovakia popolo, kaj daŭre kunbatali por paco, demokratio kaj socialismo.

Tiutage pli ol 600,000 homoj ĉeestis la memorigan kunvenon sur la Placo de Tien'an-pordego en Pekino en kiu Prezidanto Maŭ Ze-tung prezentis girlandon antaŭ la portreton de kamarado Stalin. Je tiu sama momento memorigaj kunvenoj okazis en pli ol 2000 aliaj urboj kaj urbetoj. En Ŝanhajo pli ol 800,000 homoj partoprenis en la memoriga kunveno en kiu Vicprezidanto Sung Ĉing-ling prezentis girlandon faritan de ŝi mem antaŭ la portreton de Stalin. Pli ol 700,000 homoj ĉeestis la memorigan kunvenon en Tienzino; 400,000 en Harbino; 460,000 en Kantono; 300,000 en Nankino.

Malĝojo Transformiĝis en Forton

Hodiaŭ la ĉina popolo jam transformis la malĝojon en forton—la forton por konstrui novan mondon, por defendi vigle la pacajn atingojn de la homaro kaj la daŭran pacon de la mondo.

En ĉi tiuj tagoj neforgeseblaj la ĉina popolo vidis klare la vojon antaŭen: plifortigi unuiĝon kun la Sovetunio, lerni de Stalin! Inspirite multaj petis aliĝon al la Komunista Partio, aŭ la Novdemokratia Junula Ligo por kolektiĝi pli proksime ĉirkaŭ la afero de Stalin. Meng Ŝjen-ĉung, juna laboristo de la Ŝekingsan-fabrika en la ĉirkaŭurbo de Pekino, diris, "En mia ĉambro, pendas afiŝo montranta Stalin starantan antaŭ plano pri unu el la gigantaj Sovetiaj konstruaj projektoj, kun kraĵono en mano. Hieraŭ nokte dum mi rigardis ĝin mi vidis pli klare kion ĝi signifas. Mi pensis pri la rapida progreso kiun ankaŭ ni faras en industrio kaj en ĉiu flanko de nia vivo. Kiel grandegan helpon al ni donis Stalin! Li oferis sian tutan viron por ni laboristoj, por la laboranta popolo tra

la mondo!" Tiuvespere kunvenon kunvokis la organizoj de la Partio kaj la Junula Ligo de la fabriko. Laboristoj ĵuris finripari la blovfornegon en 34 anstataŭ 54 tagoj kaj ŝpari 5 tagojn por la riparo de la kaldronego. Antaŭ la portreto de Stalin borderita per nigra funebra rubando ĉi tiuj laboristoj solene ĵuris plifortigi sian unuiĝon kun la Sovetia popolo por defendi mondpacon. Tiun dediĉon en la nomo de Stalin partoprenis milionoj da ĉinaj laboristoj.

Laboristoj en la kotonŝpinejo Hengjuan kolektigis antaŭ la portreto de kamarado Stalin kaj ĵuris: "Ni ĉiam restos en intima unuiĝo kun niaj pliaĝaj fratoj de la Sovetunio, sekvante la volon de kamarado Stalin kaj laborante por la plena efektivigo de komunismo."

En la nokto de la 7a de marto Ji Mej, laboristino de la Kotonŝpinejo de Kuejjang, kun blanka rozeto de malĝojo sur sia brusto, rompis la produkthan rekordon en ŝpinado de tiu fabriko. La laboristoj de la Nankina Inĝeniera Laborejo, portante nigrajn brakrubandojn de funebro sur siaj manikoj, duobligis sian ĉiutagan mezproduktkvanton en la 6a de marto.

Dum la adiaŭo al kamarado Stalin, komuna malĝojo unuiĝis la ĉinan popolon en la granda ago de redediĉo al la afero de la popolo por kiu li servis sinforĝese ĝis la fino. Tio estis forta demonstracio de solidareco kun la tuta granda monda tendaro de demokratio kaj paco kun la Sovetunio ĉe la kapo. Tio estis solena averto al la instigantoj de milito ke la amikeco inter ĉina kaj Sovetia popoloj bazita sur la roko de proleta internaciismo estas nerompebla; ke la ĉina popolo senlime amas la socialisman landon, la landon de Stalin, kies venka disvolviĝo estas fundamenta garantio de la plua progreso de la homaro.

La Ĉina Budĝeto de 1953

La budĝeto montras, kiel la registaro, dezirata de la popolo, prizorgas al ili la vivon materialan kaj kulturalan.

Ko Kia-lung

La budĝeto de nova Ĉinio por 1953, submetita de Po I-po, la Ministro de Financo, kaj aprobita de la Konsilo de la Centra Popola Registaro je la 12a de februaro, resumas la financon kaj ekonomian progreson de Ĉinio dum la lastaj tri jaroj. Ĝi vivece spegulas la pluan disvolviĝon de la nacia ekonomio kaj la konstantan pliboniĝon en la popola vivo materiala kaj kultura.

Ĉi tiuj atingoj estas akiritaj eĉ dum sukcesa batalo por rezisti Usonan invadon kaj helpi Koreion.

La budĝeto montras, kiel Ministro Po I-po diris, ke "unue nia financo baziĝas sur solidaj fundamentoj kaj firme progresas; due, nia ŝtata budĝeto estas budĝeto de produkto kaj konstruado; trie, la budĝeto de 1953 montras ke nia lando eniras en novan etapon de grandskala kaj laŭplana ekonomia konstruado kiu centriĝas ĉirkaŭ la disvolviĝo de industrio, kaj antaŭ ĉio, peza industrio."

La nova etapo de ekonomia konstruado komen-ciginta ĉijare fariĝis ebla dank' al la impresaj atingoj en restarigo ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949. Generale, la industria kaj agrikultura produktado jam atingis aŭ superis la antaŭliberigan plej altan nivelon. Tio ebligas la ŝtaton plue ekspansii produktadon, pliigi socian riĉaĵon, plifortigi la naci-defendon, kaj plialtigi la vivnivelon de la popolo. En mallonga periodo jam amasiĝis sufiĉe da kapitalo por komenci la unuan kvin-jaran planon de Ĉinio en 1953.

La kresko de la landa ekonomio vidiĝas el la grandega pliigo en ambaŭ enspezo kaj elspezo. Se ni prenas la enspezon kaj elspezon en 1950 kiel 100 ambaŭkaze, la enspezo en 1953 estos 336.29 kaj la elspezo, 342.97. Tiu ĉi kresko de la ŝtata budĝeto rezultanta el la ekspansio de produktado kaj la pliigo en la nacia enspezo, kune kun la ekzisto de taksata superfluaĵo de pli ol 30,000,000 milion juaĵoj, transdonota el la budĝeto de 1952 kaj la kompleta bilanco


de ĉijara budĝeto, estas atesto de la solideco kaj firma progreso de la ŝtata financo.


Budĝeto de Paca Konstruado

La budĝetoj de nova Ĉinio celas per ĉiu ebla rimedo akceli ekonomian kaj kulturalan progreson kaj dume plenumi la bezonojn de naci-defendo. En la budĝeto por 1953, la sumo asignita por disvolviĝo ekonomia, socia, kultura kaj eduka sumiĝas je 138,335,100 milion juaĵoj aŭ 59.24 procentoj de la tuta elspezo. La sumo asignita por ekonomia konstruado sola estas 103,527,600 milion juaĵoj (44.34 procentoj de la tuta elspezo), dum 22.38 procentoj de la tuta elspezo aŭ 52,253,700 milion juaĵoj estos elspezitaj por nacia defendo.

Sub la ĝenerala rubriko de ekonomia konstruado por kiu la asignita sumo montras pliigon de 41.68 procentoj kompare kun tiu de 1952, industrio ĝuas antaŭecon, ĝi ricevas 20.4 procentojn el la tuta elspezo; agrikulturo, forstigo kaj akvokonservado ricevas 5.04 procentojn; fervojoj, transportado, poŝto kaj telekomunikado, 6.36 procentojn; komerco kaj banko, 1.92 procentojn kaj aliaj konstruaj projektoj, 10.62 procentojn. Kiel ĉiuj ciferoj montras, ĉijara budĝeto emfazas produktadon kaj konstruadon.

La grandega sumo asignita por ekonomia disvolviĝo por 1953, precipe por peza industrio kaj fundamenta konstruado, rapidigos industriiĝon de Ĉinio. Kompare kun 1952, estos la jenaj pliigoj en investo en diversaj kampoj: la peza kaj maŝinfabrika industrio (en kiu investo estas la plej granda), 47.31 procentoj; la hejtaj-industrio, 84.56 procentoj; geologia esplorado kaj termezurado, 611.46 procentoj; la domkonstrua industrio, 204.14 procentoj; fervojoj, 88.93 procentoj; agrikulturo, 61.44 procentoj; kaj forstigo, 128.38 procentoj. En mon-asignado, la gvida principo estis koncentrigi monon por la disvolviĝo de industrioj de esenca graveco.





Ĉijare multe da grandaj fabrikoj konstruiĝis, renoviĝis aŭ ekspansiĝis por la fera-ŝtala industrio, por neferaj metaloj, por kemiaĵoj kaj por maŝinfabrikado. Troviĝis plimulte da novaj aŭ rekonstruitaj karbo-minoj, olekampoj kaj povo-centroj. La Popola Registaro ege disvolvos geologian esploradojn kaj termezuradojn, ekspansii la dom-konstruadon, konstrui dek unu novajn fervojojn el kiuj pli ol 600 kilometroj malfermiĝos al trafiko en 1953, daŭrigi diversajn akvo-konservajn projektojn, prepari planojn por la kompleta subjugado de Han-rivero kaj la Flava Rivero, kaj daŭrigi la plivastigon de la irigaciata areo.

Konsumajoj kaj Kulturo

La budĝeto montras, kiel la registaro, dezirata de la popolo, prizorgas al ili la vivon materialan kaj kulturalan. En 1953 agrikulturo plue antaŭenpuŝiĝis celante al pliiĝo de grena produkto ĝis ĉirkaŭ 175 milion tunoj, aŭ je 9 procentoj, kaj kotono ĝis ĉirkaŭ 1,500,000 tunoj, aŭ je 16 procentoj, kompare kun la antaŭa jaro. Ankaŭ malpeza industrio sufiĉe disvolviĝis. La produkto de koton-ŝpinaĵo, ekzemple, pliiĝos 9 procentojn; kotonŝtofo, 16 procentojn; papero, 6 procentojn; kaj sukero, 23 procentojn super la niveloj de 1952. Samtempe el ĉijara elspezo 14.9 procentoj elspeziĝos por sociaj servoj, kulturo kaj edukado, superante la sumon tiucelan de la antaŭa jaro je 12,475,000 milion juanoj.

Ke ĉi tiu estas esence budĝeto de paca konstruado montras la fakto ke la mono asignita por ekonomia kaj kultura disvolviĝo, kune kun la plejparto el la rezervaĵoj de la budĝeto, kiuj ankaŭ estos elspezita tiucele, sumiĝos ĝis pli ol 60 procentoj de la tuta elspezo.

La Ĉefa Fonto de Enspezo

La raporto pri la budĝeto fare de Ministro Po I-po montras ke ĉiam pli granda parto de la elspezo devenas de la krea laboro de la klaso laborista, de la ŝtataj entreprenoj kiuj pliiĝas produkton kaj labor-produktivon, reduktante la produktokostojn kaj pliiĝante la profitojn. 59.79 procentojn de la tuta enspezo formas profitoj kaj impostoj pagotaj de ŝtataj entreprenoj, kaj impostoj pagotaj de la kooperativoj. Estas ĝojige kompari tion kun 1950, kiam nur 34.08 procentojn de la budĝeto de tiu jaro formis ĉi tiuj enspezoj. Tio estas frapa ilustraĵo pri tio, kiel la ŝtata (socialisma) elemento de la nacia ekonomio estas ludanta la gvidan rolon.

Dume grandan progreson ankaŭ faris privataj industrio kaj komerco. Oni memoru, ke nun pli granda proporcio de nia malpeza industrio kaj komerco estas ankoraŭ en la manoj de privata kapitalo. Ĉiuj privataj entreprenoj utilaj al nacia bonstato kaj la popolo

vivrimedo havos pluan disvolviĝon ĉijare. Ministro Po I-po diris ke ankoraŭ estas grava parto en nia ŝtata politiko korekte evoluigi la aktivan rolon de tiaj privataj entreprenoj.

Malpeziĝis la Ŝarĝo Kamparana

Alia punkto en la raporto kiu meritas specialan atenton estas la relative pli malgranda ŝarĝo portata de agrikultura imposto kiel fonto de enspezo. Kvankam konsistigantaj 80 procentojn de la loĝantaro de Ĉinio, la kamparanoj kontribuis 29.63 procentojn de la tuta enspezo en 1950; 18.17 en 1951; 17.08 en 1952 kaj ili kontribuos nur 14.56 en 1953 (el kiuj 10.99 procentoj devenas de la agrikultura imposto, la "publika greno"). Tiuj ĉi ciferoj montras: dum Ĉinio estas industriiĝanta, la kamparanoj, kiel iliaj ceteraj samlandanoj, estas ĝuantaj konstante altiĝantan vivnivelon.

La grandaj atingoj de la ĉina popolo montritaj en la raporto pri la budĝeto ankoraŭfoje pruvis la suferon de la ŝtata kaj ekonomia sistemo de popola demokratio super tiu de kapitalismo. Montrante la brilajn perspektivojn kiuj kuŝas antaŭ la popolo, la budĝeto de Ĉinio por 1953 estas en frapa kontrasto kun la budĝetoj de la landoj kapitalismaj, kiuj nun furiozas en konkurenco de armado, kaj kiuj ĵetas la ŝarĝon de subtenado al la reakcia reĝimo de plenmano da monopolaj kapitalistoj sur la ŝultrojn de la laboranta popolo.

Kontrasto kun Usona Budĝeto

Ekzemple, 48.5 procentoj de la enspezo de la Usona budĝeto por la fiska jaro 1952-53 devenas de senpera imposto de individuo. La Usona Registaro asignis 74 procentojn de sia tuta elspezo, sume 58,200 milion Usonajn dolarojn, por rekta militelspezo. Rilate al paca konstruado, Ministro de Financo Po I-po citis unu frapan faktojn: la Usona Registaro elspezis nur malpli ol 5 milion dolarojn por akvokonservado dum la lastaj ok jaroj. Tio estas ja kompatinda centmiliono de la tuta Usona elspezo dum la sama tempo kaj malpli ol centono de la pli ol 550 milion Usonaj dolaroj asignitaj de la Popola Registaro de Ĉinio por akvokonservado en la daŭro de 1950-53!

Dum la mallonga daŭro de tri kaj duona jaroj depost la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, la rapideco kaj vasteco de ĝia disvolviĝo en ĉiu sfero jam ĝojigis ĝiajn amikojn kaj konsternis ĝiajn malamikojn. Jaron post jaro la novdemokratia Ĉinio antaŭenpaŝas, laŭ la vojo de industriiĝo de la Sovetunio, al pli feliĉa vivo de popolo. Ĉi tiuj rimarkindaj progresoj garantias ke la taskoj fiksitaj en la budĝeto por 1953 estos plenumitaj, por tiel havi bonan komencan por la unua kvin-jara plano de Ĉinio.

Superaj Usonaj Oficiroj Malkaŝas Bakterimilitajn Krimojn

Alan Winnington

Kiam du Usonaj altrangaj oficiroj komplete malkaŝis la planojn kaj instrukciojn de Usono por militi per mikroboj, la demando kiu sin prezentis antaŭ la politikistoj kaj propagand-planistoj en Vaŝingtono, Londono kaj Parizo estis: "Ankoraŭ kiom longan tempon povas Usono daŭre malkonfesi bakterimiliton?"

Usona malkonfeso estis ebla ne pro tio, ke antaŭe estis ajna manko de atestoj kaj pruvoj, sed ĉar mikroboj estas ja tre malgrandaj. Vaŝingtono profitis la fakton, ke la ĝenerala publiko ne ĉiuj estas specialistoj en bakteriologio, kaj tiel ĝi sentis sin tute sekura absolute nei la grandnombrajn pruvojn prezentitajn de internaciaj sciencistoj kaj legistoj, laboratoriaj specimenoj kaj fotoj, restaĵoj de bakteribomboj kaj miloj da atestantoj, fremdlandaj ĵurnalkorespondantoj kaj kaptitaj Usonaj aviadistoj.

Ordoni el la Pentagono

Tamen, la atestoj de Kolonelo Frank Schwable kaj Majoro Roy Bley apartenas al alia speco. Tiuj ĉi du homoj, la Stabo-ĉefo kaj la Armi-oficiro de la 1-a Mara Aviadalo, jam nudigis la internan sekreton de bakteria milito: kiel la Pentagono donis ordonojn pri ĝi; kiel tiuj ordonoj estis transdonitaj al la malsuperaj organizoj; kaj kiel oni efektivigis la aferon. Estas la fonto de tiu ĉi nova atestaĵo pri bakteria milito, kiu kaŭzis panikon en la ĉefurboj de Usono kaj ties aliancanoj.

En siaj apartaj kaj unuopaj skribaj konfesoj, tiuj ĉi du altrangaj oficiroj, Kolonelo Schwable kaj Majoro Bley, kiuj iam malsammaniere estis respondecaj en

esencaj rilatoj en la bakterimilita plano de Usono, rakontis:

En oktobro 1951, la Konferenco de Stabo-ĉefoj de Usono akcentis instrukcion al Generalo Ridgeway en Tokio, ordonante al li grandskalan bakterimilitadon;

Tiun ĉi instrukcion oni transdiris al la malsuperuloj inkluzive de Generalo Everest, la komandanto de la 5-a Aerarmeo, kaj ankaŭ al la 19-a Bomba Alo en Okinaŭa, bazo por B-29-oj;

La B-29-oj komencis la ĵetadon de bakteriaj bomboj en novembro, 1951, ilin sekvis B-26-oj kaj pli poste la batala-bombaj aeroplanoj, inter kiuj estis la aeroplanoj de la 1-a Mara Aviada Alo;

En majo, 1952, por malhelpi la provizo-transportadon al la fronto, oni ekspansiis bakterimiliton kaj estigis "infektan zonon" tra Koreio norde de la ĉefurbo. Ĵetado de ĥoleraj bomboj ĉe la maldekstra flanko de tiu ĉi zono estas la tasko de la Maraj Aviadistoj;

Granda klopodo estis farita por teni la sekreton, precipe for de ilia propra personaro. Sekureco (sekret-tenado) estis "afero de ŝtata politiko, ne nur afero de milita sekureco."

Neniu el tiuj, kiuj legas la de tiuj du homoj subskribitajn dokumentojn, precipe la priskribojn de Schwable pri la bakterimilita kunsido kiu okazis en la Alo-Komandejo je la 25a de majo, 1952, povas

Kolonelo Frank H. Schwable kaj du faksimilaj paĝoj de lia ĉefa konfeso



South Korea
I am Colonel Frank H. Schwable, 64489,
and was Chief of Staff of the 1st Marine Aircraft
Wing until shot down and captured in July
8th, 1952.

My service with the Marine Corps began
in 1949 and I was designated an aviator in
1951, serving duty in many parts of the world.
Just before I came to Korea, I completed a
tour of duty in the Division of Aviation at
Marine Corps Headquarters.

Division of the Joint Chiefs of Staff
I arrived in Korea on April 15, 1952, to
take over my duties as Chief of Staff of the 1st
Marine Aircraft Wing. All my instructions
and decisions were subject to confirmation
by the Assistant Commanding General,
Jameson-Scribner. Just before I assumed full
responsibility for the duties of Chief of Staff
General Jameson-Scribner called me into his
office to talk over various matters of the Wing.
During this conversation he said "The thing
I want you to do is to look over the
special mission run by MACF-521." I asked
him if he meant "Super" and he said "Yes."

He reported to me that Colonel Gayle was
both horrified and satisfied and said
he'd like to "turn in his unit." Everyone felt
like that when they first heard of it, and
their reactions on what might well be
expected from a fair-minded, self-respecting
matters of people.

Actually, this type of reaction is
totally unimportant - it is not even a War
or Corps matter - morally it is a domestic
affair; administratively and logistically it is
planned for use, it is regulated; and from
the point of view of respect and loyalty,
it is shameful.

F.H. Schwable, 64489
Colonel, U.S.M.C.
6 December, 1952

Page 2 of 14

ankoraŭ havi ian ajn dubeton pri la vereco de la faktoj kiujn ili malkaŝis.

Konfeso de Generalo Mark Klark

Sed nature, akorde al sia "ŝtata politiko" malkonfesi bakterimiliton, la Usonaj aŭtoritatoj jam klopodis ĵeti kiel eble plej multe da dubigoj sur la atestaĵojn de tiuj ĉi du oficiroj. Fakte, el la neado farita de Generalo Mark Klark, komandanto de la Usonaj "U.N."-Fortoj, jam elĉovis unu el la plej mirigaj konfesoj de la tuta afero.

Kvankam en sia komentario li singardeme evitis preparoli la aktualajn faktojn, kiujn malkaŝis Schwable kaj Bley, Klark tamen konfesis, ke la du homoj ekzistas, kaj ke ili povis fari tiujn akuzojn kaj kredeble ili jam tiel agis. Klark tiam evitis la ĉefan punkton, asertante ke la homoj faris tiajn asertojn pro la "mens-ekstermaj" metodoj de la komunistoj, firme kredante ke ĉiuj faktoj povas esti turnitaj inverse per senvalora, kontraŭkomunista publica vorto.

La atesto de Schwable kaj Bley, klara kaj precize mortza al ĉiuj ĝis nun malkaŝitaj faktoj de Usona bakterimilito depost ĝia komenco, estas per si mem la respondo al Klark—tio estas klara eĉ por tiuj, kiuj ne aŭdis ilian disaŭdigon el Pekina Radiostacio. Neniu el tiuj, kiuj legas iliajn dokumentojn, povas dubi pri tio, ke la homoj kiuj faris tiujn priskribojn estas homoj partoprenintaj la sekretojn kaj posedantaj kompletan mens-regadon, kaj krome, amare bedaŭrantaj pri tio, ke ili servis kiel iloj de Usona politiko de sekreta bakterimilito.

Je miaj renkontigoj kun tiuj viroj, ili konfirmis kaj detale preparolis siajn asertojn. Iliaj vivkondiĉoj estas bonegaj kaj ili havas abunde da noveloj kaj aliaj legaĵoj. Bley ĉagrenis pro sia peziĝo. Ambaŭ estas ordinaraj usonanoj, kun Usonaj antaŭjuĝoj kaj kredo en la "Usona vivmaniero". Tio estas ĝuste ilia malfortaĵo el la vidpunkto de Klark. Ĉar estas la Usonaj regantoj kiuj ekstermas homan menson. Ili prenas ordinarajn respektindajn familiajn virojn, bonajn civitanojn, kaj ĉiamaniere devigis ilin fari aferacojn kontraŭ sia propra konscienco kaj kontraŭ la volo

de la Usona publiko. Ili timigis ilin per minaco de milita tribunalo ke ili blinde plenumu "ŝtatan politikon" kiu estas malkonforma al la deziro kaj la intereso de la Usona nacio. La tutmondaj Mark Klark-oj ne povas kompreni, ke vere lojalaj homoj estas lojalaj al sia popolo, ne nur al siaj superuloj.

Kiam ili estas kaptitaj, ili jam estas kontraŭaj al la batalmaniero de Usono. Poste ili vidis, ke ankaŭ la ĉinoj kaj koreoj estas ordinaraj popolanoj, kiuj deziras pacon kaj traktas siajn kaptitojn grandanime kiel penspovajn homojn. Fine ili decidis ke ilia pli vasta lojaleco al la Usona popolo kaj al la homaro ja postulas ilin malkaŝi la bakterimiliton kaj tiel helpi ĉesigi ĝin.

La Registaro Ilin Trompis

En sia iom pedanta militista stilo, kia estas kutima al long-kariera oficiro, Schwable skribas jene: "...ĉiu oficiro, kiam li je la unuafojo informiĝis, ke Usono estas faranta bakterian militon en Koreio, estas kaj ŝokita kaj honta.... Veni mem al Koreio kaj trovi ke ilia registaro tiel komplete ilin trompis ankoraŭ deklarante al la mondo ke ĝi ne estas uzanta bakterimiliton, igas la oficirojn demandi sin mem en penso pri ĉiuj aliaj aferoj kiujn la registaro proklamis pri milito ĝenerala kaj en Koreio speciale."

El ĉi supraj vortoj oni povas plene kompreni la sentojn de Schwable, kaj la vortoj de Majoro Bley estas eĉ pli malkaŝaj. Tiuj ĉi asertoj havas neimiteblan sonoron de vero kaj aŭtoritato, kaj la faktoj kiujn ili malkovris estas tiel embarasigaj al la Usona Registaro ke ĝi neniel povas respondi escepte per vuala neado—daŭrigado de sia "ŝtata politiko" persisti je la "fabelo" ke bakterimilito ne estas farata, kiel Generalo Jerome diris en la bakterimilita kunveno je la 25-a de majo, 1952.

Sed por ordinaraj popolanoj, kiuj legos la priskribojn de Schwable kaj Bley, ili ja estas profunde konvinkaj dokumentoj, kaj krome, historia vojmontrilo elmontranta la danĝeran vojon laŭ kiu Usono estas kondukanta siajn "aliancantojn".

Majoro Roy H. Bley kaj du faksimilaj paĝoj de lia konfeso



North Korea
I am Roy H. Bley, Major, USMC, service number 010450. age 39, married with two children. My home is at 1333 Orange Ave., Santa Ana, California, U.S.A. I am approximately 5 weeks, until I was shot down in North Korea on the 26th of July, 1952. I was Ordnance Officer on the 4th Marine Aircraft Wing Staff in Korea.

The facts which I relate about your warfare are written by my own free will.

I arrived in K-3, Korea, on the 26th of May, 1952 and was assigned as 1st Lt. Ordnance Officer on the following day, the 29th. The previous 1st Lt. Ordnance Officer had reported for the States on the early part of May, 1952, leaving the job to be handled by a 1st Lt. McGarry, the Ordnance NCO, who had worked for him, and who had been on that job for several months.

On the night of the 2nd of June, McGarry and I were working alone in


page 701 1952.

He told me that he would be ready to establish a gunnery facility there as soon as the 1st Lt. to handle them had completed their training at K-3. This would be around the 12th of July.

On this same day, July 8th, 1952, on my way back to K-3 from K-6 with Colonel Schwable, we lost our course and were shot down by ground fire behind the front lines in North Korea.

Roy H. Bley
Major USMC, 010450
North Korea.
21st January, 1953

Page 701 1952




Membroj de la Prezidantaro de la Memora Kunveno en Pekino je la 9-a de marto, kiam 600,000 popolanoj kolektigis por adiaŭi la plej bonan amikon kaj instruiston de la ĉina popolo.

STALIN VIVAS POR ĈIAM EN LA KORO DE LA ĈINA POPOLO

23

Prezidanto Maŭ metas girlandon ĉe la portreton de Stalin.



Laboristoj de Fengtaj-stacio (maldekstre) kaj ĉe la Ŝtal-fabriko de Ŝekingsan (sube) staras kun klinitaj kapoj dum la tuta lando observas kvinminutan silenton en memoro de Stalin.



"NI ŜANGŔOS MALĜOJON EN FORTON!"

Tra la tuta lando, en grandaj memoraj kunvenoj, en fabrikoj kaj en hejmoj, la ĉina popolo esprimis sian malĝojon je la morto de la granda Stalin. Ili ĵuris ŝanĝi sian malĝojon en forton por la afero al kiu li dediĉis sian tutan vivon—la afero de feliĉo kaj paco de la tuta homaro.



La ĉinaj infanoj ĵuras imiti la ekzemplon de Stalin.



Viroj de la popolaj defendaj fortoj ĉe la granda memora kunveno en la Placo de Tien'an-pordego, Pekino

En stratetoj kaj antaŭurboj de Pekino, grupoj da najbaroj aŭskultas la disaŭdigon pri la morto de Stalin kun malĝoja koro.






Memore al Stalin, laboristoj de la Fervoja Fabriko de Ĉangŝintien ĵuras duobligi sian penon en paca konstruado.

Laboristoj de la Blovfornega Laboriteamo N-ro 1 de la Ŝtal-fabriko de Ŝekingŝan ĵuras antaŭenpuŝi la aferon de Stalin per plenumo de sia plano de 1953 por grandskala landkonstruado.




Kun la simbolo de kora malĝojo sur siaj brakoj, Meng Ŝu-ĉen, tornistino kaj membro de la Junula Ligo, kaj ŝia asistantino en iu Pekina fabriko plirapidigas produkton en la nomo de Stalin kiu montris la vojon al la plena liberigo de virinoj.





rezidanto Maŭ Ze-tung kaj aliaj membroj de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio staras en solena tributo antaŭ la portreto de Stalin kiam ili vizitas la Sovetian Ambasadorejon je la 6-a de marto por esprimi sian kondolencon. Flanke Prezidanto Maŭ staras en la mezo kamaradoj Ĉu Teh (maldekstre) kaj Ĉou En-laj (dekstre).

A POPOLO DE ĈINIO UNEBRAS LA MORTON DE STALIN



200.000 popolanoj el ĉiuj vivsferejoj en Pekino venis al la Sovetia Ambasadorejo por esprimi sian simpatian kun la Sovetia popolo.



Reprezentantoj el demokratiaj partioj kaj popularaj organizoj funebre staras antaŭ la portreto de Stalin en la Sovetia Ambasadorejo.

Hodiaŭa Paperindustrio de Ĉinio

Ĉou Min-ji

En Ĉinio ekde la liberiĝo, "ĉiu persono studas". La tuta lando estas kiel granda lernejo.

La nombro de la infanoj vizitantaj elementan lernejon en nova Ĉinio estas pli granda ol tiu de la loĝantoj en tuta Britlando. En la somero de lasta jaro, 49,000,000 lernantoj estis sidantaj ĉe skribotabloj de elementaj lernejoj; tio estis 106.9 procentojn pli multe ol en 1946 sub la Kuomintanga reĝimo, kaj pli ol 3,400,000 estis vizitantaj mezgradajn kaj altajn lernejojn kaj universitatojn.

En ĉiu registara oficejo la oficistoj regule studas frumatene unu horon aŭ pli longe antaŭ ol ili komencas sian laboron. Vespere kiam laboro de la tago estas finita, laboristoj, komizoj kaj iliaj dungantoj en la vendejoj, kaj dommastrinoj iras studi en libertempaj lernejoj. En la kamparo, precipe en vintro kiam la surkampa laboro malmultiĝas ĝis minimumo, la kamparanoj, je milionoj, iras al vintraj lernejoj.

La nombro de regulaj kaj libertempaj lernejoj por laboristoj kaj kamparanoj estas konstante plimultiĝanta. La enkonduko de la Metodo de Rapida Ellerno de Ideografoj kreita de Ĉi Kien-hua ege plifaciligas la ellernon de la ĉina skriba lingvo kaj oni esperas ke inter la vintro de 1952 kaj la printempo de 1953, pli ol 10 milionoj da popolanoj kleriĝos.

Tial estas ne mirinde ke en la stratoj de urboj kaj en la bazaroj kaj foirejoj de vilaĝoj, la librejoj kaj libro-standoj estas ĉiam klientplenaj.

Ĉio ĉi tio multe grandigis la postulon por ĉiuspecaj libroj. La nombro de lernolibroj por elementaj kaj mezgradaj lernejoj venditaj en 1952 estis duoblo de tiu en 1950. En la posta parto de 1952, pli ol 270 milionoj da lernolibroj estis liveritaj al la vintraj lernejoj kaj klerigaj kursoj por plenaĝuloj. En 1952, la nombro de libroj kaj gazetoj eldonitaj estis 55 obloj de tiu de la plej alta antaŭliberiĝa rekordo en 1936.

Je la finiĝo de la reakcia kaj malklerigisma Kuomintanga regado, la deziro de la liberigita popolo por scio ricevis plenan kuraĝigon de sia propra registaro. La fenomeno altiĝo de la postulo por presajoj signifas treege pliiĝitan postulon por papero. La paperindustrio de nova Ĉinio estas klopodanta por plenumi ĉi tiun bezonon. Pli da paperproduktaĵo estas ankaŭ postulata de la restarigitaj kaj rapide kreskantaj industrioj de Ĉinio. Oni bezonas ĝin por sakoj por cemento, por izolilo, por pakado, por la cigaredfabrikoj... La postulo por papero en industrio jam atingis grandan proporcion.

Reorganizado de Paperindustrio

La paperfabrika industrio ĉiam kontentigas la bezonon de ĉi tiu konstante kreskanta merkato. Post la periodo restariga

kaj reorganiza tuj post la liberiĝo, paperprodukto hodiaŭ multe superas la plej altan jaran produkton antaŭ la Rezistmilito kontraŭ Japana Agreso. Se ni prenas la plej altan jarprodukton antaŭ la liberiĝo kiel 100, do tiu en 1951 estis 146, kaj tiu en 1952 estis 212.

Pli ol 50 procentoj de la produkta forto de la industrio estas en ŝtataj paperfabrikoj kiuj funkcias laŭ landskala plano. En tiuj fabrikoj oni jam efektivigis ĝisfundajn demokratiajn reformojn en administrado kaj enkondukis progresintajn Sovetiajn produktajn kaj administrajn teknikojn. Privataj fabrikoj ankaŭ konformigis sian produktadon al la bezonoj de la lando kaj ludas gravan rolon en la efektivigado de landaj produktoplanoj. Ili ankaŭ plibonigis siajn metodojn, dum laboristaj-kapitalistaj interrilatoj reĝustiĝis surbaze de la Komuna Programo kiu difinis ke interesoj de ambaŭ privataj kaj publikaj entreprenoj devas esti konsiderataj kaj ke bonoj de ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj devas esti garantiataj sub la gvido de la ŝtata ekonomio.

Rezulte de ĉi tiuj ŝanĝoj, la antaŭa anarkio en la paperfabrika industrio estas esence venkita. Ne plu ekzistas postiĝinteco en la teknikoj, nek troviĝas blinda konkurenco barakti por krudmaterialoj kaj merkatoj. En ĉi tiu rilato, la ŝanĝoj en la paperindustrio estas paralelaj al tiuj kiuj okazas en la tuta privatentrepreneja sektoro de la ekonomio de Ĉinio.

(daŭrigo sur p. 91)

La papertranĉa laborejo de la Ŝtata Paperfabriko de Tienzin



Batalado Norden kaj Suden

Ĉang Li-jun

—Eminenta filmo kiu enkorpigis en si la grandan strategian teorion de Prezidanto Maŭ Ze-tung—

La filmo "Batalado Norden kaj Suden", kiu priskribas la Popolan Liberigan Militon, estas eminenta verko tre altkvalita en ideologio kaj arteco. Ĝi arte kaj figure prezentas la talentan strategian teorion pri moviĝema batalmetodo de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj estas la unua filmo kiu provas rekte prezenti la grandan strategian teorion de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj akiris unuapasan sukceson.

Historio Priskribata

Jene estas la historio prezentita de la filmo:

En la komenca periodo de la Popola Liberiga Milito, laŭ la kondiĉo ke la malamikoj estas pli fortaj ol ni, nia trupo plenumas la strategian direkton pri moviĝema batalmetodo de Prezidanto Maŭ Ze-tung. Kvankam nia trupo gajnis ĉiujn sep batalojn en norda Kiangsu-provinco ĉiutage venkante, tamen, por ekstermi

la vivan forton de la malamikoj kaj por la estonta longdaŭra bono de la popolo kaj la gajno de la tuta milito, nia trupo ne povas ne fari strategian retiron el Kiangsu-provinco al Ŝantung-provinco. Tuj sekve nia trupo retiriĝas el Taŭ-vilaĝo, la plej grava strategia punkto sur Tienzin-Pukoŭ-a Fervojo kaj grandpaŝe sin retiras al la regiono de Jimong-montaro kie altgrade koncentriginte sian ĉefan forton ĝi denove grandpaŝe marŝas antaŭen kaj ekstermas la malamikan trupon kiu sudenvenas tra Cingtaŭ-Zinan-a Fervojo. Post tiu ĉi venko nia trupo sin returnas kaj postkurante ekstermas la laciĝintan kaj izolitan trupon de la malamikoj, kiu venas el Kiangsu al Ŝantung. La perdita Taŭ-vilaĝo nun reapartenas al ni. Eksterminte la superecan forton de la malamikaj trupoj, nia trupo gajnis la decidan venkon sur la batalkampo de Orienta Ĉinio, kio pretigis avantaĝajn kondiĉojn por la sekva granda reatako.



Venkinte la Kuomintang-ajn trupojn, ĝoje renkontiĝas la kunbatalantaj Popola Liberiga Armeo kaj la gerilo de Taŭ-vilaĝo. La diviziestro manpremas kun Ĉaŭ Ju-min, vilaĝestrino de Taŭ-vilaĝo.

La historio de la filmo komenciĝas de Taŭ-vilaĝo kaj ankaŭ finiĝas per ĝi. Per la procezo inter la perdo kaj reakiro de tiu vilaĝo, la filmo konvinke kaj klare montras la prudentecon kaj grandecon de la strategia teorio pri moviĝema batalmetodo de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la justecon de la Liberiga Milito kaj la eminentajn karakterojn de la Popola Liberiga Armeo. La filmo diskonigas la militan teorion "Ne gravas la akiro aŭ perdo de unu urbo aŭ loko" de Prezidanto Maŭ Ze-tung ne per multaj "teorioj" kaj amasigo de historiaj faktoj, nek per konceptiga metodo klarigas la rilaton inter la popolo kaj la Liberiga Milito kaj la kunbataladon de la regula armeo kun lokaj milicianoj, sed ĝi prezentas la ĉefan temon per viveca priskribo pri kelkaj ĉefaj roluloj, iliaj agoj kaj ŝanĝo de ideoj kaj per organika kombino de diversaj rilatoj.

Ĉefa Temo de la Filmo

La filmo firme tenas la ĉefan temon kiun ĝi ek-prezantas jam ĉe la komenco kaj laŭ la disvolviĝo de la historio paŝon post paŝo ĝin pliprofundigas. Ĉiuj aferoj kaj personoj, kiujn la filmo prezentas, ĉiam aperas ĉirkaŭ la ideoj de la ĉefa temo.

La filmo priskribas ke ĉe la komenco kiam nia trupo plenumas la direkton de moviĝema batalmetodo, la ideoj de la batalantoj kaj malsuperaj kadroj ne akordas kun la intenco de la supera instanco kaj ke la ideoj de la popolamaso ankaŭ konfliktas kun la direkta ideo de la milito. El la filmo oni vidas ke la signifo de la strategia teorio pri moviĝema batalmetodo ne estas tuj ĉe la komenco komprenita de ĉiuj batalantoj kaj malsuperaj kadroj, kiuj ne povas kompreni kial ili "ĉiutage venkas sed ĉiutage retiriĝas". Kiam la trupo retiras sin, la batalantoj devas pene reteni la malvolontecon de retiriĝo kaj la deziron por daŭra batalado. Iuj diras mokante: "Ĉiam ni reatakas, sed fine ni reatakas al Ŝantung!" La amaso malkontentas kaj la rotestro ankaŭ ne povas klare kompreni la aferon. Ĉio ĉi estas priskribita tre verece. Ne nur la malsuperaj kadroj kaj la batalantoj, sed ankaŭ la mezrangaj kadroj kelkfoje ne povas bone kompreni. La batalionestro Kaŭ tiel diris: "Verdire, diviziestro, la batala entuziasmo de la trupo nun estas tre alta, sed ni tuj retiriĝos norden.... Tiu ĉi subita turniĝo eble estas malfacile farebla!" Ĉi tie lia ideo montriĝas esence sendiferenca kun tiu de la suprediritaj batalantoj. Tio estas vera ideo kaj tiu pormomenta nekompreneo ankaŭ estas ofte neevitebla, ĉar ilia scio estas parta kaj unuflanka kaj ili ne povas kompreni surbaze de la tuta milito la grandan signifon de la retiriĝo kiu estas por ekstermi pli da malamiko: la nuna perdo de herbo, arbo, monto aŭ rivero estas por gajni pli grandan venkon. Kvankam pormomente ili ne povas tion kompreni, tamen ĉar nia trupo havas altan organizecon kaj disciplinecon, la malsuperaj kadroj kaj batalantoj senlime konfidas al la supera instanco, tial ili ankaŭ firme plenumas la ordonon de la supera instanco. Tiun ĉi noblan karakteron de la Popola Liberiga Armeo la filmo prezentas tre impresive.

La situacio de la Popola Liberiga Milito impete evoluas kaj la ideoj de la batalantoj kaj malsuperaj kadroj ankaŭ ŝanĝiĝas en la milita praktiko. Kiam ili profunde ekkomprenas el siaj propraj spertoj la ĝustecon de la gvido de la supera instanco kaj kiam ili deskuis la partan vidpunkton kaj ekatentas al la tuta milito, ili tuj pensas akorde kun la gvidantoj. El la filmo ni povas vidi, ke ĉe la batalantoj Liu Jung-kuej, Vang Ĉun, kaj rotestro Ĉang poste estiĝis rimarkinda ŝanĝo en la ideoj. Ili komence plendis pri la retiriĝo de la trupo, sed kiam ili jam ekstermis grandan nombron da malamikoj kaj gajnis grandan venkon, Liu Jung-kuej diras: "Pelotonestro, prave en tiun ĉi direkton ni kuris, kio multe indas eĉ se perdiĝis ne unu sed 10 Taŭ-vilaĝoj!" Vang Ĉun ankaŭ diras: "Ni ne vane kuris la 450 liojn (1 lio = $\frac{1}{2}$ km.). Se ni antaŭe estus tion sciintaj, ni ne grumblus eĉ pro retiriĝo de 4.500 lioj!" Rotestro Ĉang ankaŭ diras: "Vere mi ne atendis..." Tiu ĉi ŝanĝo de iliaj ideoj estas tre natura kaj vera.

En la batalado la popolamaso ankaŭ ŝanĝas siajn ideojn kaj montras persistan batalspiriton. Obeante la bezonon de la tuta milito ili organizas gerilon kiu

penetras malantaŭ la malamikojn kaj batalas bone kunagante kun la regula armeo, ke la malamikoj ĉie estas atakataj kaj maltrankvilaj, kio kreas tre avantagajn kondiĉojn por ekstermi la malamikojn. Ekzemple tre kortuŝa estas la sceno ke la gerilanoj tondas la elektran fadenon instalitan por eksplodigi la kluzon kaj sekve garantias al nia atakanta trupo sukcesan transiron de la rivero por venkbati la malamikojn. En la filmo ni ne nur vidas la bataladon faritan de vilaĝestrino Ĉaŭ Juj-min, gemilicanoj kaj la gerilo, sed ankaŭ vidas la brankardajn kaj transportajn grupojn kiuj forte subtenas la trupon. Senĉese aperas sur la ekrano tiuj scenoj kaj personoj, kiuj estas fidinda garantio por la venko de la milito. La filmo resume prezentas la rilaton de la vasta popolo kun la milito kaj klarigas la popolan econ de la milito. La popola forto estas la fonto por la venko de la Liberiga Milito kaj la vera ferremparo de la Liberiga Armeo.

Antaŭ la Tritika Rikolto

(daŭrigo de p. 95)

portis kun li la tabulojn kaj kuris al la bordo, sed kion mi vidis tie, divenu?

Bofratino LI: La digo breĉiĝis?

LIU KING-ĈJUAN: Ne, oni jam ŝtopis la breĉon. Ili diris: "La tabuloj nun ne estas bezonataj, Maljuna Liu, ilin reportu." Kvinĉjo reportis la tabulojn kaj mi venis por sciigi vin pri tio. Kvantam ni ĵus malsupas, sed, je mia konscienco, mi ne deziras malbonon al vi.

Bofratino LI (dankeme): Tio donis al vi multan penon, Oĉjo Liu.

LIU KING-ĈJUAN: Ne, tio estas nur bagatelo. Ankaŭ Administranto estas tie ĉi, ĉion ni dankas al li. Li tre frue dividis la laboron inter la anoj, kiuj samtempe forbaris la akvon kaj riparis la digon, alie viaj du hektaroj da tero jam tute subakviĝus.

CUEJ JU-LIN: Ĉu la akvo iom malkreskis, Oĉjo Liu?

LIU KING-ĈJUAN: Ĝi multe malkreskis. (Subite) Aj, mi devas iri alkonduki la ĉevalon. Nun vi parolu pri viaj aferoj. (Foriras rapide.)

Bofratino LI (honteme): Administranto, kiam vi sendos Cuej Ju-ĉe al la urbo posttagmeze, lasu ŝin rajdi nian ĉevalon, kiu estas tre obeema.

CUEJ JU-LIN: Oni ankoraŭ ne povas certiĝi, ĉu ŝi iros rajde aŭ piede.

Bofratino LI: Ŝi nepre iru rajde eĉ kontraŭ sia volo. Kaj diru al ŝi ke ŝi ne venigu kuraciston de la urbo.

CUEJ JU-LIN: Kial?

Bofratino LI: Mi jam resaniĝis.

CUEJ JU-LIN: Tiel rapide?

Bofratino LI: Estas vi, kiu min kuracis.

CUEJ JU-LIN (ridante): Ĉu vi scias, ke ĉiuj timas ke vi veturos al la urbo?

Bofratino LI: Diru al ili, Administranto, ke mi kulpis kontraŭ ili.

CUEJ JU-LIN: Do vi disvendos la legomsemojn al ili?

Bofratino LI (kapjesante): Jes!

(Kurteno rapide falas.)

Per la sincera kaj varma amo de la batalantoj al sia hejmvilaĝo la filmo profunde prezentas la justecon de la milito. En Taŭ-vilaĝo loĝas la edzino kaj infano de batalanto Liu Jung-kuej, kaj ĉiuj batalantoj naskiĝis en la proksimeco de Taŭ-vilaĝo. La malamikoj celas okupi kaj detrui ĝuste milojn da tiaj vilaĝoj kia estas Taŭ-vilaĝo, kaj ankaŭ ĝuste tiajn lokojn niaj batalantoj penas defendi per sia sango kaj vivo. La celo de la milito estas defendi la liberigitan regionon, tieajn kreskajojn kaj la familiojn kaj feliĉon de la batalantoj mem. Kiam la trupo reokupas la vilaĝon, Liu Jung-kuej tenas plenajn manplatojn da riverakvo en la manoj kaj diras ample: "Hodiaŭ mi denove povas trinki la akvon de la hejmvilaĝo!" Kiom forte impresa estas tiu ĉi konkreta priskribo pri la eco de la milito! La justeco estas unu el la elementaj kaŭzoj de la venko de revolucia milito.

El la filmo ni ankaŭ vidas la malfacilecon de la milito kaj la optimismon de la popola armeo montritan en la malfacila batalado. Vere la milito estas malfacila. Ĉiutage la trupo retririĝas kaj longajn vojojn marŝadas. La malamikoj estas meĥanikigitaj dum niaj batalantoj havas nur milion kaj fusilojn, kaj tamen surgrimpas sur altegajn montojn, iras vojojn sur kiuj homoj tre malofte iras, kaj spitas vundiĝon kaj vivoferon sur batalkampo. La altvalora karaktero de la Popola Liberiga Armeo ne estas eviti malfacilojn, sed klopodi ilin venki, ne pesimismiĝi kaj cedi antaŭ ili. Tio estas la vera optimismo, kion ni povas pli profunde kompreni se ni nur iom rerigardas la militmarŝon, la batalojn (ekzemple la furioza batalo ĉe Kiangjunmiaŭ-stacio), la sintenon de rotestro Ĉang kaj batalionestro Kaŭ post vundiĝo, la eksplodigon de tanko fare de batalanto Vang Ĉun, kaj aliajn scenojn. La filmo bone traktas tiun ĉi temon, ĝuste prezentas la kruelecon kaj malfacilecon de la milito kaj ankaŭ ĝuste prezentas la revolucion optimismon ne arbitre neante ian ajn malfacilon nek entenante falsajn 'optimismajn' sentojn de etburĝo.

Pri la Tekniko

Je la figurigo de roloj, precipe je la figurigo de superaj kadroj la filmo ankaŭ sukcesis. La ludita de k-do Ĉen Ko diviziestro kiu estas fidela, kuraĝa, aplomba, prudenta, saĝa kaj armita de la milita scienco de marksismo-leninismo kaj la milita teorio de Maŭ Ze-tung, reliefe spegulas la plej ĉefajn trajtojn de la superaj kadroj de nia armeo harditaj de longtempa batalado. Kvankam la vivigo de tiu ĉi rolo ankoraŭ estas ne sufiĉe altgrada kaj liaj paroloj ankoraŭ aŭdiĝas iom ne naturaj, tamen ni devas diri, ke ĝi estas la plej sukcesa el la figuroj de superaj komandantoj, kiujn provis krei niaj filmoj.

En la filmo la batalantoj, vilaĝaj kadroj (ekzemple vilaĝestrino Ĉaŭ Juj-min) k.a. estas ankoraŭ ne sufiĉe reliefe karakterizitaj sed kelkloke oni ankaŭ sukcesis fari majstran ĉizadon pri tiuj figuroj kaj multaj el iliaj eminentaj trajtoj estas montritaj. La roloj de rotestro Ĉang kaj Ĉaŭ Juj-min impresas pli profunde.

La filmo ankaŭ sufiĉe bone priskribas la malamikojn ne troigante ilian ferocecon nek montrante ilin senkapablaj. La malamikoj ankaŭ havas militajn spertojn, sed ĉar ili kondukas militon kontraŭpopolan, tial estas neeble por ili gajni la venkon kaj fine ili estas ekstermitaj. La filmo ĝustgrade prezentas la

kontraŭpopolan esencon de la malamikoj, la kontraŭflikadon inter iliaj oficiroj kaj ilian hontindan fiaskon

La lingvo en la filmo ankaŭ estas sufiĉe viveca kaj vigla—literatura lingvo polurita el la vivo. Stereotipaj paroloj en tiu ĉi filmo nur malofte aŭdiĝas.

La sukcesa faro de "Batalado Norden kaj Suden" pruvas ke ni tute havas la kondiĉojn kaj kapablojn fari filmojn altkvalitajn en ideologio kaj arto, se nur la verkistoj, direktoroj kaj aktoroj volonte pene laboras.

La sukcesa faro de "Batalado Norden kaj Suden" plie pruvas la gravecon por la literaturaj kaj artaj laborantoj profunde sperti la vivon. La sukceso de Ŝen Ŝi-mong kaj aliaj kamaradoj en la verkado de tiel bona filma dramo estas nedisigebla de ilia longtempa vivo en trupo kaj ilia bona scio pri la trupa vivo, kaj ankaŭ nedisigebla de la rektaj konkretaj indikoj de la gvidantoj de la trupo. Kaj la sukcesa faro de la filmo kaj la sukcesa prezento de la aktoroj estas nedisigeblaj de la pena penetro en la vivon kaj ankaŭ de la klopodoj de la trupoj kiuj helpis la prezentadon kaj la respondeaj indikoj de la militaj konsilantoj.

La Ĝojiga Novaĵo

—Kuo Kin-haj—

Ĝojigan novaĵon aŭguras piga grakado,
Jen alvenis rekomendita letero de frato.
Mi apenaŭ havis tempon por ĝin traokuli,
La bofratino jam insistis ĝin postuli.
"Vi estas maljusta!" mi diris al la bofratin',
"Ĉu tiu intimaĵo koncernas nur vin?"
Ju pli ŝi legis, des pli ŝi ridemis
Malsigelinte la fratan leteron.
Kvankam mi plurfoje protestis riproĉe,
Tamen ŝi turnis al mi surdan oreton.
Fine mi ŝajnis koleron
Kaj kriis al ŝi laŭtvoĉe:
"Kion ja skribis frato en la letero
Ankaŭ mi volas scii pri la afero!"
Sed la vido de kolero mia
Nur instigis ŝin al rido plia.
"Ho! fraĉjo, juna fraĉjo!
Vi ne scias, ke frato via
Distingis sin en la konstruado
De akvokonservejo ĉe Huaĵ-rivero,
Kaj en solena kongreso, la unuan de julio,
Li estis elektita labor-modelo.
Multe da premiaĵoj li ricevis
Kaj nun sciigas nin per letero.
Nun prenu kaj ĝin legu mem,
Tute senmotivas via kolerem'."
Aŭdinte la ĝojigan novaĵon,
Mi saltis pro ĝojo senlima,
Kaj kaŝe de la bofratino,
Vizaĝe al la portreto de Prezidanto Maŭ
Mi ridis kaj ridis sen fino.

Antau la Tritika Rikolto

(daŭrigo)

Tan I

LIU KING-ĈJUAN (*Envenas portante kvar tabulojn. Ilin formetinte, li forviŝas ŝviton de la frunto, elpoŝigas ŝnureton por mezuri la larĝecon de la tabuloj, tiam paŝas al la ĉevalstalo kaj faras taksadon per la ŝnureto en la aero, kapjesante*): Nu, estas sufiĉe.

Bofratino LI (*eniras spiregante*): Ĉie mi serĉis vin, tamen vi venas ĉi tien.

LIU KING-ĈJUAN (*indiferente*): Serĉi min? Por kio?

Bofratino LI: Vi ankoraŭ ne scias por kio? Mi kredas, ke vi nur ĉajnigas nescion.

LIU KING-ĈJUAN: Kial vi tiel parolas?

Bofratino LI: Ĉu estas eble ke vi ne scias kion vi mem faris? Kie estas mia ĉevalo?

LIU KING-ĈJUAN: Ha, pri la ĉevalo vi parolas! Ĉu ne pluvegis dumnokte?

Bofratino LI: Kia rilato ekzistas inter la pluvo kaj mia ĉevalo! Kial ĉiuj ĉevaloj estas ĉn la stalo escepte la mian? Ne senkulpigu vin per la pluvo!

LIU KING-ĈJUAN: Ho okazis tiel: lastnokte pluvis fortege, mi ŝirmis min per kanabsako kaj eliris por esplori. (*Montrante al ŝi la stalon*) La tabuloj de la tegmento ne estis sufiĉe longaj kaj enpluvis torente.

Bofratino LI: Surdula babilaĉo! Kiu ja demandis pri tio! Mi demandis, kien vi kondukis mian ĉevalon al laboro. Se enpluvis, en la plej malbona kazo

mia ĉevalo estus tute malsekigita, sed ĉu povas esti ke ĝi tute neniigis sub la duŝo?

LIU KING-ĈJUAN: Ne, Bofratino Li, aŭskultu mian klarigon!

Bofratino LI: Lasu, ne plu klarigu! Se mia ĉevalo malsaniĝus pro trolaciĝo, la konto ne estos reguligebla inter ni.

LIU KING-ĈJUAN: Via ĉevalo ne estis kondukita al laboro.

Bofratino LI: Ĝi ne estis kondukita al laboro? Ĉu viaj okuloj blindiĝis? Rigardu, (*montrante la stalon*) kie estas mia ĉevalo?

LIU KING-ĈJUAN: En mia domo.

Bofratino LI: En via domo! (*Ŝi stultiĝas sed dubo ekposedas ŝin*) Ej! Kial vi kondukis mian ĉevalon al via domo?

LIU KING-ĈJUAN: Jes, kiel povas esti, ke mi ne konduku ĝin al mia domo? La tegmento de la stalo ne estis sufiĉe longa kaj enpluvis torente, jen la ĉevalo estis submetita al la duŝo senŝirme. Kvankam ĝi estas via ĉevalo, tamen ĝi ankaŭ estas la propraĵo de la kooperativo, ĉu mi povus ne senti kompaton al ĝi?

Bofratino LI: Ha! estis tiel! Kial vi ne klarigis pli frue?

LIU KING-ĈJUAN: Jes, kial mi ne klarigis pli frue! Mi estas tro malsaĝa.

Hodiaŭa Paperindustrio de Ĉinio

(daŭrigo de p. 87)

Teknikaj Progresoj

La enkonduko de novaj metodoj de pulpoŝarado igis la industrion sendependa de importitaj krudmaterialoj. Tiel ĝi sin liberigis de sia antaŭa duonkolonia submetiĝo al fremdlandaj provizantoj kaj estas nun firme establita sur novdemokratia fundamento.

La teknikaj plibonigoj efektivigitaj en la industrio estas la frukto de granda leviĝo de kreema entuziasmo inter la laboristoj. Ili estas ankaŭ ne disigeblaj de la malegoisma helpo donita de Sovetiaj specialistoj.

Depost la demokratiaj reformoj en la administrado de ŝtataj fabrikoj, la laboristoj jam rekte partoprenas en la administrado. Pliigita produktado ankaŭ alportis al ili pli bonajn laborpagojn, loĝadon, laborasekurajn ĝuojn, k. t. p. Estante ege interesitaj en la sukceso de la fabrikoj, ili jam elmontris grandan eltrovemon fari renovigojn kaj krei novajn rekordojn. Multaj labormodeloj aperas en la industrio.

En la vintro de 1951, respondante al la alvoko de la lando por pliprodukto kaj pli efika uzo de krudmaterialoj, Sung An-min, juna laboristo en la ruejo de la Paperfabriko No. 5 en la Nordoriento, atente studis la pulpokuirajn procedojn kaj, kune kun aliaj laboristoj en la fabriko, sukcesis elpensi novan metodon kaj pli ol duone mallongigis la tempon bezonatan por la kuirado. Tio duobligis la efikecon de la ekzistantaj

instaladoj kaj tiamaniere multege pliigis la produktan efikecon.

La industrio estis ĉiam embarasita pro konstanta manko de krudmaterialoj. Ĉar la arbaroj ne estis protektataj dum la Kuomintanga reĝimo, arboj estis laŭplaĉe faligitaj kaj sekve rezultigis serioza nesufiĉo de ligno kaj lignopulpo. La Sovetia specialisto Vieriekin kiu venis helpi la industrion post liberigo proponis la produkton de duonkemia pajlopulpo, kiu sukcese komenciĝis en decembro, 1951. La tempo de kuirado de ĉi tia pulpo estas mallonga, la kosto estas malalta, kaj la kvalito de la papero el ĝi farita estas bona.

Oni taksas, ke se duono de ĉiuj globaj ruuoj en la paperindustrio estas uzataj por kuiru duonkemiaj pajlopulpon, ni povas ĉiujare produkti pliajn pli ol 100,000 tunojn da pulpo. La jara ŝparo tiel akirita sufiĉas por aĉeti maŝinojn kiuj povos produkti 180 tunojn da papero ĉiutage.

La nova procedo povas esti ankaŭ adaptita por uzi tritikigojn, sukerkanajn restaĵojn (sukerkanojn kies suko estas elpremita), fragmitojn, bambuojn kaj aliajn fibrajn materialojn. Tial ĝia enkonduko jam multege plirapidigis la disvolviĝon de la paperindustrio.

La progreso de la unua kvinjara plano de Ĉinio kompreneble venigos grandan novan antaŭenpaŝon en kulturo. Tio alportos pli grandajn postulojn al la paperindustrio. La komenca plano por 1953 postulas 6 procentan plialtigon en paperprodukto kompare kun 1952. Kaj la sekvantaj jaroj alportos al ĝi pluan disvolviĝon.

Bofratino LI (*subite*): Ej! Ĉu vi manĝigis mian ĉevalon lastnokte en via domo?

LIU KING-ĈJUAN: Tiu demando estas superflua. Ĉu mi povis lasi ĝin malsati? Dum la nokto mi manĝigis ĝin trifoje per tranĉita herbo miksitaj kun fazeolo.

Bofratino LI: Ĉu vere? mi ne kredas.

LIU KING-ĈJUAN: Kredi aŭ ne, tio estas via libero.

Bofratino LI: Vi flegas tiujn ĉevalojn tute egale?

LIU KING-ĈJUAN: Laŭ vi, mi traktas iun pli bone ol aliajn?

Bofratino LI: Kiu ja vidus, se vi donus pli multe da furaĝo al via ĉevalo kaj tiu de la Administranto ol al la niaj?

LIU KING-ĈJUAN: Kian sensencaĵon vi parolas! Ĉu vi konsideras min kiel tian fiulon?

Bofratino LI: Vi mem scias plej bone.

LIU KING-ĈJUAN: Bofratino LI, vi ne rajtas pentri bonulon en la koloro de kanajloj. Oni devas paroli laŭ pura konscienco.

Bofratino LI: Konscienco! Ĉiu havas sian konsciencon apartan kaj neniu povas penetri en alies koron por certigi.

LIU KING-ĈJUAN: Via intenco estas fari kverelon kontraŭ mi. Se vi trovas, ke mi flegas la ĉevalojn malbone, diru al la anoj ke iu alia prenu mian lokon kaj mi okupos min per io alia.

Bofratino LI: Eĉ se vi rezignas, ĉu vi pensas, ke oni ne trovos alian ĉevalflegiston inter tiom da anoj de la kooperativo?

LIU KING-ĈJUAN: Do iru al tiu, kiun vi konsideras kompetenta.

Bofratino LI: Mi kredas, ke ĉiu povas bone plenumi vian laboron; vi ja ne estas unika en tio.

LIU KING-ĈJUAN: Tre bone, mi lasas mian laboron al vi, se vi estas tute kompetenta, mi rezignas. (*Li koleregis.*)

LI MING-FA (*eniras kun tolo uzata por frot-purigi la*

maŝinon): Mi miris kun kiu vi parolas. Pri kio vi kriaĉas tiel arde al Oĉjo Liu?

LIU KING-ĈJUAN (*kurante al li*): Ming-fa, vi diru, en kio pruviĝas, ke mi flegas la ĉevalojn malbone?

LI MING-FA: Vi flegas ilin tre bone.

LIU KING-ĈJUAN: Estu honesta! Se mi flegas malbone, tion eldiru tute malkaŝe.

LI MING-FA: En nia vilaĝo ne troviĝas alia kia vi.

LIU KING-ĈJUAN: Sed via edzino malkonsentas, ke mi restu plu en la ofico!

Bofratino LI: Vi mem rezignas.

LI MING-FA (*al sia edzino*): Ĉesu babilaci. (*Al Liu*) Oĉjo Liu, tio ne dependas de ŝia vorto.

LIU KING-ĈJUAN: Min vidante ŝi tuj kverelis kun mi. Unuvorte, ŝi diris, ke mi ne flegas la ĉevalojn egale bone. Ĉu tia ofenda vorto estas elportebla?

LI MING-FA: Ne koleru, Oĉjo Liu, ni ne estas fremduloj.

LIU KING-ĈJUAN: Se mi estus tiel egoisma, mi ne alportus la tabulojn por ripari la ĉeval-stalon.

LI MING-FA (*ekzamenante la tabulojn*): De kie vi akiris la tabulojn, Oĉjo Liu?

LIU KING-ĈJUAN: Mi malkonstruis mian budeton.

LI MING-FA: Kial vi malkonstruis vian budon?

LIU KING-ĈJUAN: Ĝi estas difektita kaj ne plu uzebla, tial mi deprenis de ĝi kelkajn tabulojn por ripari la stalon.

Bofratino LI: (*kun miro*): Ha! ĉu la tabuloj estas viaj?

LIU KING-ĈJUAN: Se ne miaj, ĉu do viaj!

Bofratino LI: Ĉu vi vere alportis por ripari la tegmenton de la stalo?

LIU KING-ĈJUAN: Hm, juĝu laŭ via plezuro. Mi havas nenion por paroli kun vi. Mi tuj alkondukos vian ĉevalon. (*Eliras kolere.*)

LI MING-FA: Kiel vi kolerigis la maljunulon!

Bofratino LI: Vi ĉiam parolas sen ia zorgo, vi scias nenion eĉ se la ĉevalo mortus de peza laboro.

LI MING-FA: Kion mi ne scias?

Bofratino LI: Ĉu vi scias kien la ĉevalo iris?

LI MING-FA: Ĉu Oĉjo Liu ne hejmen iris por alkonduki ĝin?


Bofratino LI: Vi ĵus aŭdis tion, tamen vi ne vidis, ĉu la ĉevalo troviĝas en la stalo aŭ ne.

LI MING-FA: Kiel vi povas certigi, ke mi ne vidis? La Administranto diris al mi frumate ke dum la nokta pluvego li eliris sub ŝirmo de lankovrilo por helpi manĝigi la ĉevalojn, kaj Maljuna Liu kondukis nian ĉevalon al sia domo. Ĉu mi ne sciigis pli frue ol vi? Sed vi jam venis kvereli kun li eĉ ne informiginte antaŭe.

Bofratino LI: Kion fari se la ĉevalo malsaniĝus pro troa laboro! Mi rajdos al la urbo sur ĝi.

LI MING-FA: Kion vi volas en la urbo?

Bofratino LI: Mi jam diris al Cvej Ju-ĉe, ke mi iros al la urbo por konsulti kuraciston.



Plugado de grenkampo

de Ĉang Kaj-min

LI MING-FA: Konsulti kuraciston? Je kio vi malsaniĝis?

Bofratino LI: Mi diris, ke mi havas kordoloron.

LI MING-FA: De kiam vi havas kordoloron? Kial mi ne sciis?

Bofratino LI: Vi ne scias, vi scias nenion pri la hejmaj aferoj.

LI MING-FA: Ja kion vi celas?

Bofratino LI: Kion mi celas! Eĉ tiun ereton da saĝo vi ne posedas. Jam estas tempo por rikolto, ĉu oni donos forpermeson, se vi dirus ke vi iras forvendi la legomsemojn? Nun tio havas grandan debiton. Se ni ne vendus nun, estus tro malfrue post la rikolto, tial mi mensogis.

LI MING-FA: Sensencaĵo!

Kiu donis al vi permeson forvendi la legomsemojn! Ĝuste pro tio mi volas paroli kun vi.

Bofratino LI: Ne forvendi! Dek kvin kilogramoj da brasiksemoj kaj dek kilogramoj da napsemoj. Tiom vi bezonas por manĝi aŭ por semado?

LI MING-FA: Ankoraŭ tiel multe! Lastfoje demandite vi ne eldiris la veron kaj mi konjektis, ke restas maksimume dek kvin kilogramoj. Se tiel multe ni havas, ne nur al ĉiuj vilaĝanoj sed eĉ al la kooperativo ni povas havigi iom da tio por semado.

Bofratino LI: Hm, tamen mi ne vendos al ili.

LI MING-FA: Kial? Oni ja ne pagos malpli!

Bofratino LI: Ĉu vi povas antaŭdiri kiom ili pagos?

LI MING-FA: Estas konsentite ke ili pagos laŭ la merkaptoprezon.

Bofratino LI: Ankaŭ merkaptoprezoj estas malsamaj. Mi ja intencas profiti la nunan ŝancon kaj forvendi ĝin je la plej alta prezo.

LI MING-FA: Kion vi havas en via kapo? Ĉu vi sonĝas riĉiĝi vin per tiuj legomsemoj?

Bofratino LI: Ili estas mia posedaĵo. Se mi volas ilin forvendi, kiu havas la rajton min malhelpi!

LI MING-FA: Sed ne decas, ke vi iru nun al la urbo, ankaŭ la Administranto ne donos al vi forpermeson.


Bofratino LI: Se li rifuzos doni al mi forpermeson, kial li traktas egalajn kooperativanojn malegale?

LI MING-FA: Jen vi argumentas tute malracie. Vi eĉ ne konsideras, kiu konduku la traktoron, se oni ne sendus ŝin al trejnado. Ĉu vi povos ĝin konduki?

Bofratino LI: Ne diru al mi tiajn sensencaĵojn!

LI MING-FA: Ĝuste tio estas sencoplena. Ŝi estas partiano, modela kadro kaj virina komitatano, ŝi povas skribi leteron kaj legi ĵurnalon; kial vi ne enbias al ŝi ĉion ĉi tion, sed nur la vojaĝon al la urbo?

Bofratino LI: Mi ne povas esti egala al ŝi. Mi scias ke vi malestimas min elkore.



Tranokta ĉarostacio en Norda Ĉinio

de Vang Ĉi

LI MING-FA: Kion vi parolas! Vi devas bone pripensi, por kio ŝi iros al la urbo kaj por kio vi.

Bofratino LI: Por kio iros? Mi volas gajni iom pli multe. Mi havas mian kalkulon. Vi eĉ ne pensas, ke vian vatitan bluzon vi jam portis tri vintrojn kaj ĝiaj manikoj estas truitaj. Mi intencas aĉeti post la ricevo de la pago en la urbo iom da blua kepro por superŝtofo kaj iom da kvadratumita katuno por subŝtofo kaj kudros por vi novan bluzon en tiu ĉi jaro. Sed vi rigardas min kvazaŭ malamikon kaj mia bona intenco eltiras de vi nur malsaton.

LI MING-FA: Sed vi devas ja distingi kia estas la afero kaj kia estas tempo.

Bofratino LI: Kia tempo?

LI MING-FA: Nun la interhelpaj grupoj rigardas dubeme al nia rikolto. Ĉu ni povas fiaskigi la gravan taskon de la kooperativo pro sia bagatelo?

Bofratino LI: Sed mia vojaĝo ne forportos la rikolton. Ĉu oni ĉesos rikolti pro mia foresto?

LI MING-FA: La problemo ne kuŝas tie ĉi. Nun konsideru, se ĉiuj nur zorgus pri siaj legomsemoj, la tritiko restos forgesita en la kampoj.

Bofratino LI: Se mi ne irus al la urbo por iom gajni, de kie venus via nova bluzo?

LI MING-FA: Kio pli gravas, la bluzo aŭ la tritiko de la kooperativo?

Bofratino LI: Sed mi estas via edzino, mi ne povas ne zorgi pri vi!

LI MING-FA: Sed mi estas ĝia ano, mi ne povas ne zorgi pri la kooperativo!

Bofratino LI: Mi....

LI MING-FA: Ankaŭ vi estas kooperativano, ĉu vi povas apudstari kaj rigardi senage, se la aliaj ne havos legomsemojn por prisemi siajn ĝardenojn kaj ne havos legomojn por manĝi?

Bofratino LI: Neniu antaŭvidas kiam ni ricevos la pagojn, se ni vendos al ili la legomsemojn.

LI MING-FA: Oni tuj pagos kiam la tritiko estos draŝita kaj forvendita.

Bofratino LI: Vi revas tre bele! Ĉu ili vendos sian tritikon? Eĉ mi mem ankoraŭ ne intencas forvendi la mian.

LI MING-FA: Kiel vi scias ke ankaŭ ili konservos la sian por pli profita okazo? Kia terura mondo estus, se ĉiuj tiel kalkulemus kiel vi!

Bofratino LI: Ne kiel mi! Ĉu vi pensas, ke ili estas ĉiuj stultuloj? (*Daŭra silento. Li Ming-fa paŝas al la loko kie kuŝas la tabuloj.*)

LI MING-FA (*subite*): Vera stultulo estas Maljuna Liu! Kial li malkonstruis sian budon? (*Rigardante al la tegmento de la ĉevalstalo.*) Rigardu, tiel larĝe oscedas la tegmento de la stalo, kiu ne povos esti kovrita sen tiuj kvar tabuloj.

Bofratino LI (*rigardante supren*): Vi parolas prave. Tiel konvenaj por ĝi tabuloj ne troviĝas en aliaj domoj.

LI MING-FA: Vera malsaĝulo estas tiu maljunulo. Kiu instigis lin alporti la tabulojn? (*Paŭzeto.*) Mi iru lin serĉi, ke li reportu ilin! (*Li volas foriri, sed la edzino lin retenas per kapto.*)

Bofratino LI: Kion vi faras? Ĉu vi ne aŭdis de Maljuna Liu, ke nia ĉevalo forte suferis de la pluva duŝo lastanokte?

LI MING-FA: La ĉevalo estas nia, sed la tabuloj estas liaj. Kial ni uzu liajn tabulojn?

Bofratino LI: Li mem ne domaĝas, kial vi bedaŭras tiom por li? Eĉ tian simplan kalkulon vi ne scias fari!

LI MING-FA: Mi ne scias kalkuli, sed Maljuna Liu ja bone kalkulis. Lia tuta posedaĵo konsistas el unu kaj duona ĉambroj kun kuir-kameno. Kiom valoras ĉio ĉi? Nur la riĉa rikolto de la kooperativo

donos al li veran profiton. Se la ĉevaloj labora energie sub lia zorga flegado, la kooperativo rikoltos pli multe da greno.

Bofratino LI: Se la kooperativo rikoltos pli multe, ankaŭ li ricevos pli grandan dividaĵon.

LI MING-FA (*emfaze*): Jes ja, tial li rigardas la kooperativon kiel sian propran hejmon.

CUEJ JU-LIN (*eniras kun la stomak-kuracilo*): Ho, ankaŭ Bofratino Li estas tie ĉi! Via ardeco egalas al tiu de la novaj paroj, tiel varma, ke vi ĉiam troviĝas kune kiam neniu estas apude. (*Ambaŭ silentas.*) Kial vi ne parolas? Ĉu malnovaj geedzoj kiel vi ankoraŭ hontas paroli antaŭ aliaj?

LI MING-FA: Kien vi iris, Administranto?

CUEJ JU-LIN: Mi ĵus vizitis kun mia fratino la distriktan komisaron kamarado Sju. Ni baldaŭ sendos ŝin al la urbo posttagmeze.

LI MING-FA: Ĉu ŝi konsentis jam?

CUEJ JU-LIN: Jam konsentite. (*Al Bofratino Li*) Ĉu ne ankaŭ vi volas iri al la urbo?

Bofratino LI: Vi scias jam, Administranto?

CUEJ JU-LIN: Ĉu vi povas kaŝi ĝin de mi? Mi scias eĉ la celon de via vojaĝo.


LI MING-FA: Jes ja, Administranto, mi ĵus parolis kun ŝi longe pri tio.

Bofratino LI (*al sia edzo*): Kiu parolis kun vi! (*Al Cuej Ju-lin*) Mi ja ne estas mensogulo, Administranto.

CUEJ JU-LIN (*ridante*): Kiu diris, ke vi mensogis?

Bofratino LI: La celo de mia iro....

CUEJ JU-LIN: Mi scias, ke vi intencas konsulti la kuraciston pri via kordoloro, (*montrante la stomak-kuracilon al ŝi*) jen Cuej Ju-ĉe jam elserĉis por vi la kuracilon.



La Birdo al la Birdotimigilo: "Mi kutimis pensi ke vi estas terkulturisto, sed nun mi bone scias—terkulturistoj portas bonajn vestaĵojn!"

Pentrita de
Su Kuang

LI MING-FA: Administranto, ŝi estas, ve al mi, tiel obstinaĉa!

CUEJ JU-LIN: Se ŝi estas malsana, ŝi devas konsulti kuraciston, tio ne estas obstineco. Ne pravas, se vi domagas monon.

LI MING-FA: Ne, mi ne diras tion.

CUEJ JU-LIN: Do kion vi volas diri? Vi devas rapide konsulti la kuraciston, se ŝi estas malsana.

Bofratino LI (*ĝoje*): Vi konsentas ke mi iru al la urbo, Administranto?

CUEJ JU-LIN: Ne, nun vi ne bezonas iri.

Bofratino LI (*surprizite*): Mi ne bezonas iri?

LI MING-FA: Dekomence estas ne necese por vi iri.

CUEJ JU-LIN: Distrikta komisaro Sju jam scias pri tio, li tre zorgas pri la farto de la kooperativanoj kaj petis Cuej Ju-ĉe porti leteron al la urbo,—Ĉu vi ne diris, ke Doktoro Jang povas kuraci vian malsanon?—por venigi la kuraciston al ni, do kian bezonon vi havas por iri al la urbo?

LI MING-FA: Ne, Administranto, ne venigu la kuraciston.

CUEJ JU-LIN: Nun la urbaj kuracistoj iras volonte al la kamparo, ili eĉ venus sen peto, kaj certe venos ricevinte la leteron.

LI MING-FA: Kion, kion fari!

CUEJ JU-LIN: Estas nenio, tio kostos al vi malmulte. Se vi ne havas monon efektive, vi povas pruntepreni de nia kooperativo. Antaŭ ĉio ŝin kuracu.

LI MING-FA: Vi eraras, Administranto, ĉu vi forgesis kion ni parolis inter ni?

CUEJ JU-LIN (*ŝajnigante sencion*): Kion ni parolis inter ni?

LI MING-FA: Mi ne parolos plu, lasu ŝin mem diri. Mi simple faros laŭ mia parolo hejmen irinte. Nun mi ne havas tempon, mi ankoraŭ devas purigi la rikoltan maŝinon. (*Li forlasas ilin malbonhumore kaj eniras la kabanon.*)

CUEJ JU-LIN (*ridas post lia dorso*): Bovhumoro! (*Al Bofratino Li*) Ne gravas, nia kooperativo prizorgos tion se li ne. Trankviliĝu, la kuracisto nepre venos en unu-du tagoj.

Bofratino LI (*maltrankvile*): Sed mi....

CUEJ JU-LIN: Ne maltrankviliĝu, eĉ se la kuracado kostos multan monon, ni klopodos por vin helpi. Ja ĉiuj estas same kooperativanoj, kiel ni povas rigardi senage. (*Donante al ŝi la stomak-kuracilon*) Unue prenu tiun ĉi skatoleton da stomak-kuracilo.

KOREKTOJ

1. La klarigo de la bildo sur p. 55 devas esti legata: La aliaj ŝin urĝis, kaj finfine, nur kun granda peno, ŝi eligis la jenan frazon: "Se oni ne edziniĝas, tio ja ne signifas feŭdismon."
2. P. 63, kolono 1, linio 4, la vortoj En la laborkampo la unua fojo devas esti legataj: En la laborkampo estas uzataj pli ol du dek specoj da maŝinoj. Jen estas la unua fojo

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 4

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—La Memora Kunveno por J. V. Stalin sur la Placo de Tien'an-pordego, Pekino, je la 9a de marto, 1953.

La Plej Granda Amikeco

Funebras la Tuta Lando pri la Morto de J. V. Stalin

La Ĉina Popolo Funebras la Morton de Kamarado Klement Gottwald

La Ĉina Budgeto de 1953

Superaj Usonaj Oficejoj Malkaŝas Bakteri-militajn Krimojn

Hodiaŭa Paperindustrio de Ĉinio

Batalado Norden kaj Suden

Antaŭ la Tritika Rikolto

Bofratino LI (*ne sciante kion fari*): Ne, mi ne volas.

CUEJ JU-LIN: Prenu, ĝi estas tre efika.

Bofratino LI: Ĝin mi ne akceptos malgraŭ viaj argumentoj.

CUEJ JU-LIN (*ridante*): Vi timas ke ĝi ne povas vin kuraci? Nu, eble ne, se ne estas stomak-malsano kiu ĝenas vin! (*Ŝi klinas sian kapon senparole. Paŭzeto.*) Ĉu vi scias nian komunan aferon?

Bofratino LI (*surprizite*): Ha!

LIU KING-ĈJUAN (*eniras rapideme*): Kia domaĝo! Ĉu vi ne scias, Bofratino Ming-fa?

Bofratino LI: Domaĝo? Kion vi volas diri?

LIU KING-ĈJUAN: La rivera akvo superbordiĝis kaj viaj kampoj apudriveraj eksubakviĝis!

Bofratino LI: Ha! Kial ĝuste la miaj eksubakviĝis!

LIU KING-ĈJUAN: Jes ja, je la konscienco, ni ĉiuj apartenas al la sama kooperativo kaj ni ĉiuj mal-kvietiĝis, kiam viaj kampoj eksubakviĝis.

Bofratino LI: Kion fari? Do kion fari? (*Ŝi volas forkuri sed estas retenita de Liu.*)

LIU KING-ĈJUAN: Estu pacienca, mi ankoraŭ ne finparolis. Viaj kampoj komencis subakviĝi, sed la aliaj sukcesis forbari la akvon.

Bofratino LI: Vere la akvo estas forbarita?

LIU KING-ĈJUAN: Aŭskultu. Ĉu mi ne hejmeniris por alkonduki la ĉevalon? Mi apenaŭ alvenis hejmen, kiam Kvinĉjo venis kaj diris al mi: "Tuj pruntedonu kelkajn tabulojn por ŝtopi la breĉon en la digo, Oĉjo Liu!" Mi ne plu atentis la ĉevalon.

(daŭrigo sur p. 89)



Fruktoj

regionoj la vitoj formas senfinan verdan tegmenton, sub kiu oni povas iri de vilaĝo al vilaĝo. La gastamaj ĉinaj fruktokulturistoj estas ĉiam kompleksaj al iu ajn neatendita vizitanto: ili lasas al li plenan liberecon ĝui produktaĵojn en iliaj fruktoĝardenoj kaj afable diras al li tion kaj ĉi tion pri la fruktoj.

Krom manĝi freŝe, enkaniigi, kaj fari vinon, la ĉinoj havas ankoraŭ specialajn procedojn por prepari la fruktojn. La 'sukerigita fruktaĵo' reprezentas unu el la fame konataj procedoj utiligi fruktojn. Oni senŝeligas kaj forigas la kernojn aŭ semojn

de fruktoj, bolkuiras ilin kune kun purblanka sukero, kaj poste ilin sunsekigas. La akvo en la frukto estas anstataŭita per sukero, la freŝaodoro de frukto estas retenita, kaj la dolĉa gusto kaj la rezervebleco pliiĝas. La fama, multe ĉatata miel-daktilo estas produktaĵo laŭ tia procedo. La 'sukerigita fruktaĵo' jam plurfoje akiris por la Pekinaj laboristoj honor-menciojn en internaciaj ekspozicioj. Persimono kaj daktiloj povas esti proceditaj laŭ plej diversaj manieroj.

La fruktaj produktado kaj merkato en Ĉinio antaŭ liberigo estis senĉese ŝrumpiganta. Sub kruela ekspluatado de bienuloj, la fruktokulturistoj ne havis la rimedojn pli bone kulturi kaj zorgi siajn arbojn; la popolo ĝenerale, kondukante ekstreme mizeran vivon, ne havis la eblecon ĝui fruktojn; kaj krome, sub la Kuomintanga reĝimo, Usonaj fruktoj invadis la jam mallarĝan ĉinan merkaton: ĉio ĉi venigis al la ĉinaj frukto-kulturistoj universalan bankroton.

Dum la mallonga daŭro de tri jaroj post liberigo la situacio jam tute ĉanĝiĝis. La kulturistoj, akirinte ĝardenojn por si mem kaj ricevante de la registaro helpon en tekniko kaj kapitalo, jam treege altigis sian produktan entuziasmon; rezulte de la altiĝo de vivnivelo de la popolo, fruktoj fariĝis ĉiutaga necesajo; kaj, dank' al la disvolvigo en interlanda komerco, ĉinaj fruktoj ĝuas ĉiam pli vastan merkaton.

Nun la produktokvanto de fruktoj en kelkaj ĉefaj lokoj jam superas la plej altan rekordon antaŭmilitan, kaj ankaŭ la kvalito plialtiĝis. Tamen la kamparanoj rigardas tion nur kiel komencon, ili havas la kredon kaj decidemon ke ili povos produkti ankoraŭ pli multe da pli bonaj fruktoj por sia patrio.

Multspecajn fruktojn produktas Ĉinio. En la suda parto de la lando troviĝas la tropikaj fruktoj kiaj ananaso, banano, kokoso, liĉi kaj *lungjan*, el kiuj la lastaj du estas raraj en la mondo; en la norda parto produktiĝas pomo, piro, vinbero, persimono kaj kratagbero; dum persiko, pruno, abrikoto, daktilo, ktp. kreskas en multaj regionoj de la ĉina teritorio.

En vintro, kiam la temperaturo en la Nord-oriento estas 40 gradoj sub nulo, la fruktoĝardenoj en Kuangtung estas en riĉa verdeco kun maturaj fruktoj bonodorantaj. Dank' al la favoraj naturaj kondiĉoj, kune kun la penaj klopodoj de la laboremaj fruktokulturistoj, Ĉinio posedas pli ol mil specoj de fruktarboj, kaj freŝaj fruktoj estas aĉeteblaj en ĉiu ajn sezono de la jaro.

Ĉinio, fama pro siaj abundaj kaj multspecaj fruktoj, jam komencis planti fruktarbojn antaŭ kelk mil jaroj a. K. Kulturite kaj diskreskigite dum longaj periodoj, la fruktarboj de Ĉinio povas rivali kun tiuj de iu ajn lando en la mondo en ambaŭ nombro de specoj kaj kvalito.

Ĉinio ankaŭ enkondukis multajn bonajn fruktospecojn el fremdlandoj. La pomo, kiu eniris en Ĉinion antaŭ sepdek kelkaj jaroj, nun estas vaste plantita en duono de la ĉina teritorio norde de Jangze-rivero. Ĝi ne nur retenas sian originalan bonan econ, sed ankaŭ, evoluinte, akiris novajn trajtojn. Ĝi jam fariĝis unu el la ĉefaj fruktoj de Ĉinio.

Krom la orang-arbaroj kaj pom-arbaroj, kiuj ĝenerale ampleksas dekojn da kvadrataj kilometroj aŭ kovras po kelkajn montetojn, ankaŭ la ceteraj fruktoj estas grandkvante kulturataj. Ekzemple, la vito estas universale plantita, de Sinkiang en la ekstrema okcidento ĝis Ŝantung ĉe la orienta marbordo. En kelkaj